Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 23 — trimonata

2/93

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

BARANDOVSKA-FRANK, Vera, Methodus Lingvarum Novissima . . 1
HORST-KOLINSKA, v.d., Mila, Ĉu la Cseh-metodo malmodernigis? . . . 8
Recenzoj pri pedagogiaj kaj rilataj verkoj
- GLOSSOP, Ronald J., Monda Federigo? Kritika analizo de Federacia Monda Regado (smg) 9
- KOLKER, Boris, Vojaĝo en Esperanto-Lando (ĉerpaĵoj) 10
- SYMOENS, Edward, Al nova internacia lingvo-politiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto. (Recenzis: smg) 13
- PITT, Klaas, STILMA, Bert, Kvar jarcentoj, Komenio. Tradukis Barcsay Zsuzsa. (Recenzis: d-ro Till Dahlenburg) . . . 14
- SARKÖZI, János, Adamo kaj Eva. (Recenzis: Bernard Golden) . 15
- ONET, Ionel, Primii paşii în Esperanto (rumana lernilo) 23
- SMIDÉLIUSZ, Katalin, Ĉu vi aŭdis, ke...(libro +kasedo) smg/sm. . 24
- KARMI, Ĥana, La senmorta piano. Redaktis: Josef Murĵan. . . . 33
- BACEV, Marin, Kalendaro instrua 1993. (Recenzis: E. Symoens) . 33

28a KONFERENCO kaj 3a GIMNAZIO de ILEI: Informilo, aligilo . . 17
VERWOERD, Ton, Amikeco trans la markolo (raporto pri aranĝo) . . 21
Okulume tra niaj sekcioj (raportoj el sekciaj bultenoj de Britio, Germanio, Nederlando, Nord-ameriko kaj Ĉinio – smg. 22
GRÖTZNER, Armin, Renkontigo kun la bavara eduka ministerio . . . 25
Rezultoj de la enketilo pri E-instruado (IPR 92/2). (Mirska E,Kovács M). 27
Komitato de ILEI (stato je 22 junio). Diskut-punktoj por Paterna . . . 31
Kalendaro de aranĝoj por instruistoj kaj junuloj, aŭg-dec 1993 (smg) . . 32
ANDREASSON, Bertil, Financa raporto pri 1992 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MacGill, Eso u 7 III, HU-1034 Budapest, Hungario. *Kunordigo, planado, eldonado, rilatoj kun UEA kaj la movado. (provizore ekzamena sekretariado)*
Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*
Sekretario: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*
Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongingun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel, Germanio. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*
Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

METHODUS LINGUARUM NOVISSIMA
la lasta pedagogia ĉefverko de Komenio

Vera BARANDOVSKA-FRANK

Teksto de prelego dum la Konferenco de ILEI en 1992, Bratislavo

Tradicie oni nomas Komenion "instruisto de nacioj", substrekante lian proponon de lernejsistemo kaj liajn pedagogiajn principojn de instruado racia kaj konforma al aĝo kaj kapabloj de lernantaro. La plej konata el tiutipaj verkoj estas *Didactica Magna*. Inspiron al ĝi donis al Komenio *Bericht von der Natur und vernunftmassigen Didactica* de germana aŭtoro Elias Bodin. Tiun ĉi li tralegis mallonge antaŭ sia foriro al Leszno en 1628 kaj baldaŭ skizis laŭ ĝi la propran didaktikon. Kiel gimnazia instruisto en Leszno li spertis precipe instruadon de la latina lingvo, kiu ankoraŭ en la 17-jarcento estis la plej uzata internacia lingvo kaj lingvo de sciencoj generale. Tiel estas klarigebla fakto, ke granda parto de liaj didaktikaj verkoj okupiĝas ĝuste per instruado de la latina, kaj sekve ĝia metodaro uzeblas por ĉiuj lingvoj ĝenerale. Lingvoinstruadon tuŝas precipe jenaj verkoj:

- Annotationes super Grammaticam novam Ianualem
- Pro latinitate Ianuae linguarum suae apologia
- De instruendis e latinae linguae vestibulo exercitis ad praeceptorem commonefactio
- De sermonis latini studio
- Grammatica latina nova methodo ad iucundam facilitatem
- Grammaticae facilioris praecepta
- Ianua linguarum reserata
- Latinum redivivum
- Lexicon atriale latino-latinum
- Schola latina

Ĝistiamaj lernolibroj alportis maldigesteblan liston de gramatikaj reguloj, kiujn la lernanto devis parkeri, same kiel tutajn frazojn de romiaj aŭtoroj kaj aron de eldiroj kaj vortkunigoj, kiujn li en praktika vivo apenaŭ povis uzi. Instruistoj, krom traduko de unuopaj vortoj uzis dum la instruado precipe la latinan, lernantoj do estis devigataj parkeri anstataŭ kompreni la esencon de tio, kion oni mekanike enkapigis al ili. Ilian perceptkapablon aŭ memorkapablon cetere neniu instruisto respektis. Komenio mem diras: "Mi ofte priploris miajn junulajn jarojn, malbonigitajn per malfacilaĵoj dum lernado de la latina lingvo". Tamen li spertis, ke la tutan malĝojigan procedon oni povas klarigi multe pli simple kaj mallonge. Jam en 1615 estis publikigita en Anglio la hispana *Ianua linguarum*, skribita en Salamanka universitato kaj diskonigita de Johann von Bodec. Dum sia instruado en Leszno 1628 – 1632 pretigas Komenio libron *Ianua linguarum reserata,* kun plentitolo: Pordo de lingvoj malfermi-

ta, tio estas mallonga kaj facila maniero de kompreno al iu ajn lingvo kune kun la komencoj de liberaj artoj, en kiu en cent titoloj kaj en mil eldiroj enhavigas ĉiuj vortoj de la lingvo. En kio estis la progreso de *Ianua*? Unue, kiel diras la titolo, la tuta lernolibro apogis sin en sia klarigo kaj traduko je la gepatra lingvo. Plue, ĝi enhavis 8000 plej uzatajn latinajn vortojn el diversaj fakoj kaj homaj agadkampoj: naturo, laboro, moralo, familio, profesioj ktp. Tiuj vortoj ne plu estis prezentataj al la lernantaro por esti pasive parkerataj kaj memorigataj, sed ili estis kunigitaj en mil frazoj, do sekve oni pli bone povis kompreni kaj memori la vortojn en kunteksto, la unuopaj nocioj estis pli klaraj kaj krome ĉiu frazo alportis iun konkretan informon pri iu vivparto aŭ homa agadkampo. La lernolibro do ne plu estis deŝirita de konkreta situacio, sed ilustranta la realan vivon. La aŭtoro mem estis surprizita per rapida akcepto kaj diskonigo de tiu ĉi nova metodo. La verko estis tradukita en plurajn lingvojn (pola, germana, nederlanda, sveda, franca, angla, eĉ en kelkajn orientajn lingvojn). *Ianua* – t.e. pordo, fakte malfermis al Komenio vojon en la mondon.

Lia instruista laboro inspiris lin al pripensoj de la celo kaj organizo de la tuta instrusistemo. Li skribis *Informatorium*, kie li klarigas komplekson de edukaj kaj klerigaj ŝtupoj, kiu konformas al la aĝo de lernantoj kaj samtempe al la celoj de unuopaj eduketapoj: post baza eduko en familio eniras la infano ĝeneralan lernejon, kiu gvidas ĝin de rekono de eksteraj al internaj, abstraktaj aferoj, plibonigas ĝian imagopovon kaj memoron. La tria ŝtupo postulas edukon kaj instruadon en gimnazioj, kiuj estas preparlokoj por akademioj kaj altlernejoj. Tiuj ĉi estu alireblaj al talenta junularo sendepende de tio, ĉu la gepatroj estas nobeloj, riĉuloj aŭ simplaj malriĉaj homoj. Tiu ĉi fakte demokratia ideo, ke ne la nomo, sed klereco kaj scio estu veraj homaj valoroj, signifas fondon de novepoka pritrakto de homa personeco. Instruisto vidu precipe, ke liaj lernantoj estas homoj kaj celu ilian pliperfektigon, kies plej alta celo estu la ĝenerala saĝeco, pansofio.

Tiel, logike, post *Ianua linguarum* sekvas *Ianua rerum*, pordo de aĵoj. Ĝi devas esti universala lernolibro, alportanta informojn el ĉiuj sferoj de kono kaj scienco tiamaniere, ke nenio estu forgesita. En *Prodromus Pansophiae* vidiĝas la intenco ankoraŭ pli klare: idealaj estas enciklopediaj konoj kaj necesas kreo de enciklopedia, pansofia ĉefverko. Tiucele vizitas Komenio Anglion en 1641–1642 kaj kunlaboras kun grandaj sciencistoj. Sed malfavoraj politikaj kondiĉoj igas lin forlasi la landon. Akceptante inviton kaj subtenon de la sveda registaro, li skribas en Elbing sep bazajn pedagogiajn verkojn, inter ili *Vestibulum linguae latinae* kaj *Linguarum methodus novissima*, kiujn li transdonas al sia mecenato Louis de Geer en 1646 kaj li finprilaboras ilin por presejo en 1648. *Methodus* estas praktike la fina verko de la tuta ciklo de liaj lingvometodikaj libroj. Intertempe jam skiziĝas alia ĉefverko, kiu plenigas la lastajn vivjarojn de Komenio, nome sep-parta konsilaro pri rebonigo de homaro.

Pri neniu alia pedagogia verko de Komenio ni havas tiom precizajn informojn koncernantajn la kialon de ekesto kaj laborprogreson, kiom ĝuste pri *Methodus*, tamen la finpretigita verko poste aspektis alimaniere, ol la aŭtoro unue celis, ĉar li intertempe deziris realigi tion, kion li fine opiniis sia persona dumviva ĉefverko, nome sian pansofian laboron. Konatas el korespondaĵo de Komenio, ke li havis malfacilaĵojn dum finpretigo de tiu ĉi verko. Granda sukceso de *Ianua linguarum reserata* en 1631 igis lin pensi pri la verko kvalite pli valora kaj laŭ lia propra opinio ankaŭ pli helpdona por la homaro, pri *Ianua rerum*. Li anoncis tion skribe al sia amiko kaj eldonisto Samuel Hartlib, kiu eldonis lian *Prodromus pansophiae*, do iun antaŭparolon al pansofio, sub la nomo *Conatuum Comenianorum praeludia*. Ĝi tuj vekis atentemon de progresemaj sciencistoj precipe en Anglio, kie ĝi estis publikigita.

Oni reagis al tiu-ĉi libro kaj sendis al la aŭtoro proponojn pri praktika realigo de pansofiaj ideoj, pri internacia kunlaboro ktp. La administranto de urbo Leszno, Rafael Leszczynski, mem subtenis la konservigon de la proponita laborstrukturo de pansofiaj verkoj kaj por Komenio, kaj por liaj kunlaborantoj. Esperplena vizito de Londono, je invito de ekestanta scienca kolegio kaj celanta signiforiĉan laboron sur la kampo de enciklopediaj konoj, bedaŭrinde ne povis esti sufiĉe fruktodona pro ekestanta landmilito.

Gravan ŝanĝon en la vivo de Komenio do alportis alia invito, helpe de la nederlanda komercisto kaj humanisto Louis de Geer, kiu ebligis al la jam konata pedagogo persone pridiskuti liajn metodojn kun la sveda kanceliero Axel Oxenstjerna. Li jam delonge interesiĝis pri reformo de la sveda lernejsistemo kaj povis trastudi diversajn proponojn, precipe tiujn de Wolfgang Ratke. Komenio laŭ li estis la plej taŭga persono por prilabori lernolibrojn de la latina lingvo. Nun ekestis dilemo, ĉu plueniri en la verkado pansofia, aŭ ĉu akcepti larĝaniman oferton de la Svedoj, kiuj efektive dum ses jaroj pagis ne nur al Komenio kaj al liaj plej proksimaj kunlaborantoj (Pavel Cyrill, Petr Figulus, Daniel Nigrin), sed ankaŭ helpis vivteni samreligianojn de Komenio en pola ekzilo. Komenio mem transloĝiĝis kun sia familio al Elbing, kie li povis senĝene labori. Tamen, kiel grava funkciulo de sia eklezio (Bohemaj fratoj) li dum tiu-ĉi periodo devis ĉeesti kelkajn kongresojn por pritrakti estontecon de sia eklezio kaj ĝia kunlaboro kun aliaj eŭropaj eklezioj. Tia delogado de lia pedagogia skribaktiveco kompreneble ne plaĉis al la svedaj mecenatoj, kaj el leteroj de Komenio al Hartlib ni ekscias pri diversaj malfacilaĵoj kun finpretigo de la teksto de *Methodus* . Ĝi fakte devis esti kerna verko, teorie kompletiganta aliajn lernolibrojn, kiuj ja jam antaŭe aperis, sed ne estis tiom eksplicite sistemigitaj. Komenio denove prilaboras sian priskribon de antaŭaj du ŝtupoj de baza lernejo, *Vestibulum* kaj *Ianua*, kaj aldonas la trian, *Atrium*, kiuj ĉiuj enhavas latinan tekston, gramatikon kaj vortaron.

Sukceso de *Methodus* estis granda, menciindas sciencistoj, kiuj, tuj enkondukis ĝin praktike en lernejon aŭ instruis laŭ ĝi en noblaj familioj, ekz. Petrus

Colbovius el Meklenburgio, grafo Opalinski en Sirakovo, Adam Weinheimer el Esslingen, profesoro Magnus Hesenthaler el Tubingen k. a. Komenio mem respondas al ĉiuj laŭdleteroj, ke tamen restas kelkaj mankoj, kiujn li pli detale priparolas en alia sia libro, *Ventilabrum sapientiae.*

La verko mem estas dediĉita al Louis de Geer per kelkpaĝa antaŭparolo. En la unua ĉapitro estas pritraktata la esenca valoro de lingva fenomeno. Ni ne forgesu, ke la verkisto estis sincere pia teologo, laŭ li do la lingvo apartenas al la iloj de dia saĝo kaj estis donacita al homoj, por ke ili defendu kaj flegu ĝin. Same kiel la racio servas al kompreno de aĵoj kaj la mano al kreado de aĵoj, la lingvo servas al komuniko pri ili. Komuniki oni povas ja eĉ sen vortoj, ekzistas gesta lingvo, sed ankaŭ lingvo skribita kaj parolata.

Komenio ne aŭdacis malaprobi la regantan eklezian opinion, ke la lingva diverseco ekestis dum babela konfuzo. Tamen li jam vidas filologian parencecon de lingvoj. En Eŭropa lingvoregiono li priskribas kvar bazajn lingvojn, nome la grekan, la latinan, la germanan kaj la slavan. Tiuj-ĉi estas elirfontoj por pluraj aliaj: la latina por la lingvoj itala, hispana kaj franca, al la germana lingvogrupo krome apartenas la lingvaj nederlanda, dana, sveda, angla kaj islanda. Slavaj lingvoj estas la kroata, la ĉeĥa, la serba, la pola, la rutena, la moskova kaj la bulgara. Li rimarkas, ke la hungara lingvo ne apartenas al iu ajn el tiuj-ĉi ĉefaj grupoj kaj prijuĝas al ĝi originon verŝajne azian. Probable ĉiuj tiuj lingvoj havas komunan originon. Sed ili ĉiuj unuope deziras disvastiĝi kaj esti pli bonaj ol la aliaj.

Triobla estas la ilo por lingvoflegado: terminologio, vortaro kaj gramatiko. *Ianua linguarum* estu terminologia enkonduko (nomenclatura rerum). Ne ĉiuj lingvoj kapablas esti flegataj samgrade, ĉar kie ne estas aĵoj, ne ekzistas nomoj por ili. Praktike neniu lingvo estas flegita perfekte. Sed tamen oni preferu lerni unu lingvon por ĝenerala interkompreniĝo, ĉar lernado de multaj lingvoj estas tempoperdo – per lernado de multaj lingvoj oni ne iĝas pli saĝa, ĉar la saĝeco baziĝas sur konoj de faktoj kaj ilia ĝusta uzo. Do, kial ĉiu devus lerni unu lingvon: unue tiu-ĉi lingvo mem pliperfektiĝas fare de ĉiuj uzantoj, due ĝi povu servi kiel modelo por la aliaj lingvoj, kaj trie, ĝi iĝu universala interkomprenigilo. Sed ja, ĉiu nacio, celanta antaŭenpuŝi sian propran lingvon, havas ankaŭ klerigan, religian aŭ politikan kromcelon. Sur tiu-ĉi loko Komenio mencias grandajn lingvojn, kiuj diskoniĝis dank'al kultura aŭ politika ekspanzio: la grekan, la araban, la hispanan, eĉ la kuskanan en Peruo kaj la mongolan en Azio.

Poste prezentiĝas opinio de sciencisto Luís Vives pri la latina: tradicie, ia latina lingvo ŝajnas esti la plej taŭga, ĉar ĝi jam estas konsiderinde disvastiĝinta kaj vaste uzata en literaturo. Ĝi estas belsona kaj respektata de ĝiaj uzantoj, kaj ĝi efike helpas interkompreniĝon en kristana mondo. Komenio aprobas tiujn-ĉi argumentojn, tamen li ne opinias la latinan ideala, rilate al precizeco, esprimpovo kaj precipe al lernkapablo.Sed la lingvo mem ne kulpas pri tio, ĉar ĝi ne estas instruata kaj flegata laŭ taŭgaj metodoj.

Nun estas kritikata senpripensa memorigado de vortoj kaj gramatikaj formuloj. Ekzistis jam instruistoj antaŭ Komenio, kiuj strebis forigi tiujn-ĉi erarojn: Melantchon kritikas instruistojn, kiuj lernigas mekanike, sen uzo de reguloj. Lubin opinias tiutipan instruadon ne nur malagrabla, sed eĉ danĝera por junaj knaboj kaj rekomendas pli multajn praktikajn lingvajn ekzercojn, eĉ iun kunvivan domon (coenobium), kie ĉiuj instruistoj, sed ankaŭ servistoj, kuiristoj kaj kunlaborantoj parolus nur latine, do tie la lernantoj povus tute senpene, kvazaŭ en antikva Romo, lerni la latinan. Same Janus Cecilius Frey proponas fondiĝon de latinaj kolegioj, ankaŭ Michel de Montaigne bonvenigus ilin. Ekzistis eĉ konkretaj provoj plifaciligi la lernadon de gramatiko helpe de tabeletoj kaj superrigardoj, ekz. tiu de Ezechiel Vogelius kaj Gaspar Seidel. Aliaj pedagogoj rekomendis pli racian legadon de latinaj aŭtoroj (Caselius,Ratke). Komenio konvinkigas legantojn, ke nova, racia metodo estas ege grava, se oni celas pli novan edukiĝon kaj klerecon de lernantoj, do ne nur instrumetodo pri la latina, sed ĝenerale instrumetodo, kiun oni povas apliki eĉ al aliaj klerigbranĉoj.

Tio donas al li eblecon klarigi la esencon de didaktiko mem, ĉi foje estas fakte scienca pritrakto de tiu-ĉi disciplino, kun principoj de lingvoinstruado. Ili estas destinitaj al edukitaj instruistoj de latinaj lernejoj, portantoj de nova pedagogia movado, do ne plu, kiel en *Didactica Magna*, al gepatroj kaj instruistoj de bazaj lernejoj, al kiuj Ii klarigis ĉion pli ĝenerale kaj baznivele. Nur ĉitie li povas science pravigi kaj defendi sian metodon. Ankaŭ la postuloj pri la ecoj de instruisto estas interesaj. La instruisto estu unue personeco instrukapabla, due edukita en sia profesio, trie li interesiĝu pri sia profesio kaj faru ĝin kun respondeco, li mem estu modelo por siaj lernantoj. Reliefigitaj estas motivigo de lernantoj, taŭgaj ekzemploj, ĝeneraligo de reguloj, procedo de simpla kaj malpli konata al pli malfacila instruaĵo, disciplino en la klaso,taŭgaj ekzercoj de perceptado, rememorigado, prijuĝado ktp. Tiu-ĉi parto de *Methodus*, ĝia deka ĉapitro, estas vera ars didactica, klasika verko de pedagogio, ne nur pro sia enhavo, sed ankaŭ pro la formo – klare vidiĝas la instruarto kaj procedo analizo – sintezo – sinkrezo. La sinkrezo komparas konatan kun la nekonata tie, kie ekzistas paraleleco de instruaĵoj. Tiu-ĉi parto montras la veran didaktikan majstrecon de Komenio. Surbaze de ĝi pritraktas poste la sekva ĉapitro instrucelojn, longecon kaj dispartigon de lingvoinstruado, precipe tiun de la latina lingvo, pluaj ĉapitroj parolas pri didaktikaj rimedoj kaj helpiloj, pri vortaroj, lernolibroj, ekzercaroj, gramatikoj, legolibroj, iliaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. La unuaj tri instruiloj estu *Vestibulum, Ianua* kaj *Atrium.* Ili preparu la lernanton por legado de literaturaj verkoj. Ĉiuj tiuj tri antaŭŝtupoj estas poste detale priskribitaj kaj analizitaj. Instiga estas ankaŭ konsiloj por legado, speciale por elekto de taŭgaj latinaj tekstoj – oni do legu verkojn de historiistoj, oratoroj, poetoj, filozofoj, medicinistoj, juristoj, oni ne forgesu fari skribajn notojn kaj atenti pli pri la enhavo ol pri la stilo.

Poste evidentiĝas praktika flanko de la nova instrumetodo: ĝi enligos disvastigon de la latina lingvo inter ĉiuj nacioj, ĝi helpos plurlingvecon kaj laŭ la latina ekzemplo pli bonan evoluigon de naciaj lingvoj, plue ĝi pli instigos studadon de ĉiuj disciplinoj, inkluzive studadon de la biblio, ĝi kreskigos saĝecon, helpos al pli bona organizo de lernejoj kaj al ĝenerala klereco,kaj ĝi alportos sciojn al malkleraj homoj. Ne mankas la postulo de unueca prononcmaniero de la latina, kaj pli detala klarigo, kiel tiu-ĉi lingvo povas helpi al pliriĉigo de naciaj lingvoj, precipe en terminologio. Lernado de la latina plifaciligas lernadon de aliaj lingvoj, tamen estas rekomendata ne dediĉi tro da tempo al lernado de multaj lingvoj, ĉar multe pli utila estas lerni "aĵojn", do sciencojn. Bona metodo, diras Komenio same kiel Descartes, estas necesa por ĝuste vivi kaj agi, bona metodo edukas homojn. Al tiu celo devas esti transformitaj ankaŭ lernejoj, por ke ili ne estu malinteresaj kaj timataj lokoj, sed ili iĝu laborejoj de homeco, klereco kaj edukiĝo, ne nur gravmienaj kaj tro seriozaj, sed ankaŭ amuzplenaj kaj ludemaj. La ludoj multe helpas dum la instruado, ili maturigas instruaĵon kaj kunigas lernejojn kun la praktika vivo. Grava ankaŭ estas, ke la instruistoj mem estu profesie bone preparitaj, ĉar malbona instruisto povas multon fuŝi.

Taŭga kaj efika nova instrumetodo estas komparata kun la eltrovo de libro-presado, kiu multe helpis kaj progresigis eldonadon kaj diskonigon de libroj, same la instrumetodo pliperfektigos instruadon ĝenerale. Ĝi povas helpi al edukiĝo kaj klerigo de ĝis nun neglektataj homgrupoj kaj nacioj (*Ianua* estis tradukita eĉ en lingvojn araba, turka, persa kaj mongola) kaj al disvastigo de kristaneco.

Je la fino la aŭtoro petas kompetentajn sciencistojn kaj instruistojn, ke ili reagu al tiu-ĉi verko kaj sciigu pri siaj opinioj kaj kritikaj rimarkoj. Aprezata estas ankaŭ kultivado de naciaj lingvoj kaj bonvenigataj ĵus ekestantaj sciencaj akademioj, kiel "Academia della Crusca" en Italio kaj "Fruchtbringende Gesellschaft " en Germanio, kiuj evoluigas lingvoesploradon, ekzemple en lingvoetimologio. Ni povas sperti eĉ kelkajn ekzemplojn de etimologia laboro, ekzemple tradukon de la latina "*cuniculus*" en la germanan "*Kuningen*", el kio iĝis per falsa etimologia rilato al "*Konig*" ĉeĥa traduko "*kralik*" (malgranda reĝo), same kiel pola "*krolik*". Komenio deziras fondiĝon de "collegium philo-logicum", filologia kaj esplorlingva organizo, oficialigita kaj protektata de ŝtataj institucioj, kaj en la lasta ĉapitro de *Methodus* li petas oficialajn decidpovajn instituciojn, ke ili favorigu kaj ekestigu tiajn kolegiojn kaj modelajn lernejojn.

Kiel en ĉiuj liaj verkoj, ankaŭ ĉi tie ne mankas religiaj konsideroj: teologoj estas petataj protekti kaj iniciati bonkvalitan lingvoinstruadon, ĉar tiu-ĉi multe kontribuos al disvastigo de pansofio kaj ĝenerala klereco, kiu ja ne kontraŭas kristanan kredon, sed male helpas ĝin firmigi. Kiel jam menciite, proksimume dum la sama tempo kiel *Methodus* naskiĝis koncepto de granda verko, kiun Komenio opiniis multe pli grava por la ĝenerala edukiĝo de homaro, nome

"De rerum humanarum emendatione consultatio catholica", kie la lingvokonoj kaj lingvoinstruado ludas gravan rolon de peranto de ĝenerala klereco kaj saĝeco. Dum en *Methodus* estas nur aludita ebleco de konstruo de iu taŭga, perfekta universala interkomprenigilo kaj tiu-ĉi rolo restas al tradicie flegata latina lingvo, en *Consultatio* aperas la ideo de konstruita universala lingvo, kiu envicigas Komenion al interlingvistoj.

La graveco de *Methodus* estas sendube en ĝia pedagogia kaj didaktika valoroj, kiu siatempe ŝanĝis senefikajn metodojn de lingvoinstruado. Jam en 1647 angla parlamento petas la aŭtoron pri traduko en la anglan. La presigo de *Methodus* iĝis iom malfacila pro politikaj kaŭzoj. En 1648 finiĝis la tridekjara milito per la vestfalia packontrakto, kiu estis katastrofa por ĉiuj ĉeĥaj kaj moraviaj nekatolikoj. La katolika religio iĝis ununura oficiala en iliaj hejmlandoj, kio praktike devigis vivi Komenion kaj liajn samreligianojn en eterna ekzilo. En 1649, kiam *Methodus* estis eldonita en Leszno, la granda pedagogo trovis sian lastan instruistan laborlokon en Sárospatak, kie li praktike kaj modele prezentis siajn instrumetodojn inkluzive ludaj teatraĵaj scenoj. Lian ĉefan devizon ni povas legi sur la kovrilpaĝo de la unua eldono de *Methodus*: *Omnia sponte fluant, absit violentia rebus* (ĉio fluu memvole, perforto malestu en aĵoj), instruado do iĝu facila kaj spontanea, instruistoj ne tro devigu siajn lernantojn labori, la lernejo iĝu loko ne plu timata, sed agrabla kaj ŝatata.

Vera BARANDOVSKA-FRANK
Kleinbergerer Weg 16b
D-W-4790 Paderborn



Ĉu la Cseh-metodo malmoderniĝis?

Kelkfoje oni aŭdas tian demandon de personoj, kiuj ne komprenas *kio* estas la ĉefa principo de tiu metodo.

Ĉu-demandoj apartenas la la plej facilaj demandoj, ĉar la respondo estas jes aŭ ne. Ĉifoje kompreneble la respondo estas **ne**. Ĉu la metodo, per kiu ĉiuj patrinoj de la mondo insturas propran lingvon al siaj infanoj povas malmoderniĝi? Certe ne, do la samo rilatas Cseh-metodon, kies bazo estas instrui „laŭ patrina metodo" (kiel nomis ĝin Cseh mem dum la seminario en Harrogate en 1961), ĉar tiel kiel patrino adaptas la instruadon al la kapablo kaj intereso de infano, tiel kondutas instruisto, instruante Esperanton laŭ Cseh-metodo.

Pro tio ne ekzistas lernolibro por lernantoj, estas **nur** gvidlibro por instruantoj kun gramatika skeleto, aldonaj tekstoj kaj metodikaj konsiloj, kiujn ĉiu Cseh-instruisto devas kapabli adapti al la nivelo kaj intereso de lernantoj. Ĉio do dependas de la instruisto. Rolo de instruisto estas grava en ĉiu instru-metodo, sed precipe en la Cseh-metodo, kie la instruisto (pro manko de lernolibro por la lernantoj kaj instruante **per** Esperanto) estas la sola lingva aŭtoritato por la lernantoj.

Multaj homoj nomas sin Cseh-instruanto, sed ... nur malmultaj el ili konas vere la metodon. Tion mi konstatis, transprenante gvidadon de Cseh-seminarioj en 1984. Post tiu konstato la Internacia Esperanto-Instituto (IEI), dezirante helpi al E-instruantoj pli bone koni la lingvon, la metodon kaj atingi profesian nivelon, enkondukis (tiam kunlabore kun s-io Audrey Childs-Mee) trigradan edukadon de Cseh-instruistoj:

A-seminario (enkonduka), al kiu oni akceptas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la metodo. Nur tiuj, kiuj post tiu seminario sukcese demonstros 5-minutan provlecionon, ricevas ateston kaj rajtas daŭrigi la studadon en **B-seminario (pliprofundiga)** kaj **C-seminario (diplomiga)**. Tiu lastnomita seminario finiĝas per ekzameno antaŭ internacia komisiono, en kiu troviĝas reprezentanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La diplomo estas aprobita de ILEI kaj nur personoj kun tia diplomo (do NE atesto post A- aŭ B-seminario) rajtas nomi sin Cseh instruisto.

Laŭ la 5-jara statistiko (1985–1990) A-seminarion partoprenis 365 personoj el 36 landoj. El tiu nombro (en la sama periodo) la studadon daŭrigis kaj la metodon praktikis 67 personoj. El tiu nombro 12 sukcesis atingi diplomon.

Tiu ĉi statistiko montras, ke proksimume kvinono de la partoprenantoj de A-seminarioj komencas instrui laŭ la Cseh-metodo, la resto pro la malfacileco de tia instruado rezignas aŭ transiras al tradicia instruado dum kiu ili edukas nur pasivajn uzantojn de la lingvo. La plendon, ke tradicia instruado ĝenerale edukas nur pasivajn uzantojn, oni aŭdas de diversaj flankoj kaj pri ĉiuj lingvoj. Post kurso por komencantoj, gvidata de vera Cseh-instruisto, la lernantoj aktive komunikas unu al la alia pri diversaj ĉiutagaĵoj.

Ekzistas aktuala listo de diplomitaj Cseh-instruistoj (momente kun la nomo kaj adreso de 23 personoj el 13 landoj de 4 kontinentoj, mankas ankoraŭ Aŭstralio). Organizantoj de E-kursoj, kiuj deziras dungi diplomitan Cseh-instruiston, petu la liston ĉe IEI.

Ĉiujare okazas 7 ĝis 9 aranĝoj dum kiuj funkcias kursoj, gvidataj de Cseh-instruistoj, ofte observataj de lokaj tradiciaj E-instruantoj, kiuj pli kaj pli montras intereson pri la metodo kaj foje eĉ postulas organizon de Cseh-seminario. Pro tiu kreskanta intereso IEI komencis enkonduki trejnadon de gvidantoj de Cseh-metodaj seminarioj. Ekde 1991 okazas individuaj trejnadoj por ĉiuj tri gradoj de seminario. En kunlaboro kun la Azia Fondaĵo de UEA en 1991 tian trejnadon finis s-ino GU Jian-Hua el Ĉinio, instruistino de fremdaj lingvoj en Tradicia Ĉin-medicina Instituto, reprezentanto de IEI por Azio. En 1992 similan trejnadon sekvis s-ro Atilio ORELLANA ROJAS, reprezentanto de IEI por Sudameriko (ankaŭ laŭ profesio instruisto de fremdaj lingvoj). En 1993 diplomon de gvidanto de Cseh-seminarioj ricevis s-ino Katalin SMIDÉLIUSZ, instruistino de fremdaj lingvoj ĉe universitato de Szombathely, Hungario.

Supre menciitaj faktoj atestas, ke la Cseh-metodo ne nur NE malmoderniĝis, sed kontraŭe, komencas pli ka pli penetri la instruistan mondon, malgraŭ tio ke intertempe naskiĝis multaj aliaj instru-metodoj, de kiuj neniu ĝuas tian famon, konfirmitan per praktiko, kiel la Cseh-metodo.

Mila van der Horst-Kolinska
Internacia Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag
Nederlando

Laste aperis...

Monda Federiĝo? Kritika Analizo de Federacia Monda Regado, de Ronald J. Glossop. Jefferson, 1993: McFarland & Company Inc., Box 611, Jefferson, NC 28640. 272 paĝoj. $28. Ĉi tiu estas anglalingva verko de nia vic-prezidanto kun titolo *World Federation? A Critical Analysis of Federal World Goverment.* La eldoneja varb-folio priskribas ĝin jene: 'La 21a jarcento povos iĝi la epoko de globalismo, kun neregistaraj organizoj kiaj la Ruĝa Kruco, *Greenpeace* kaj Amnestio Internacia servanta la mondon sen atento al naciecoj. Ĉu la sekva paŝo estas federacia monda regado?

La poroj kaj kontraŭoj de demokrata federacia monda regado estas zorge ekzamenataj ĉi tie, kiel ankaŭ la bazaj konceptoj de tia federiĝo kaj la rilatoj inter la leĝaro kaj la registaro. La analizo de la aŭtoro gvidas al la konkludo, ke globa federiĝo estas neevitebla, spite multajn obstaklojn. Profesoro ĉe la Sud-Ilinojsa Universitato (Edwardsville), la aŭtoro verkis nian bone vendatan lernolibron: 'Konfrontante militon: Esploro pri la plej prema problemo de l'homaro.'

Pasporta Servo 1993. TEJO anoncas la aperon de la plej freŝa listo de gastigantoj kun 900 adresoj en 72 landoj. Mendu ĉe UEA: 24,00 gld. Por pli da informoj aŭ por anonciĝi kiel gastiganto skribu al: Pasporta Servo, Ron Keetlaer, Postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando. (smg)

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

Perfektiga kurso

Sub tiu titolo la Moskva eldonejo *Progreso* eldonis novan libron de Boris KOLKER. Ni publikigas komencon de ĝia antaŭparolo kaj iom el la abunda ekzercaro kiu havas krean karakteron.

Bonan tagon, kolego! Jes, en nia aŭtobuso, vojaĝonta en Esperanto-lando, estas unu libera loko. Kion ni faros dum la vojaĝo? Ni konatiĝos kun la historio, kulturo, vidindaĵoj de tiu belega lando, kun ĝiaj plej interesaj homoj. Kaj ni tiel profunde studos ĝian lingvon, ke vi povos fariĝi civitano de tiu lando, kiu ne estas sur la geografia karto. Mi diros al vi sekreton: se vi montros vin interesiĝema, laborema kaj kapabla, ĉe la fino de nia vojaĝo vi, eble, eĉ ricevos propran pecon da tero sur la plej alta monto de tiu lando - Verda Parnaso. Okupu do lokon, kolego, kaj vojaĝu kun ni! Ek!

Kara leganto! Vi tenas en la manoj unikan libron, kiu celas:

– profundigi vian konon de Esperanto ĝis tia grado, ke vi povos ne nur libere legi ajnan libron, sed ankaŭ verki bonstile;
– enkonduki vin en Esperanto-literaturon kaj pli vaste en Esperanto-kulturon;
– montri al vi laboron de modela Esperanto-klubo;
– pliricigi viajn ĝeneralajn konojn.

La libro estas verkita kvazaŭ taglibro de ideala Esperanto-klubo, en kiu vi renkontiĝos kun steloj de Esperanto-kulturo kaj ankaŭ kun (dume) malpli konataj esperantujanoj. La plejparto de la tekstoj estas originale verkitaj en Esperanto kaj jam ie publikigitaj.

Estas uzitaj diversaj tipoj de ekzercoj. Jen specimenoj:

1. Klarigu en Esperanto, kion signifas la subaj vortoj (ekzemple: oficialulo – oficiala persono; modernulo – homo kiu emas alpreni ĉion plej modernan; fervorulo – homo kiu fervoras pri io).

Blindulo, fantaziulo, orgojlulo, teoriulo, spegulo, potenculo, neologismulo, babilulo, okulo, fuŝulo, kulpulo, stultulo gratulo, krimulo, hazardulo, formulo, maldekstrulo, ĉarnulo, ruĝulo, fakulo, funkciulo, regulo, fremdulo, spitulo.

2. La vortfarado en Esperanto estas ege riĉa kaj ofte ebligas krei vortojn, netroveblajn en la naciaj lingvoj. Kun helpo de *-in-, -edzin-, -id-, -idin-, -inid-* **formu novajn vortojn** (kiuj estas regulaj kvankam ofte nekutimaj) de la sekvaj vortoj:

Veterano, burokrato, agento, diktatoro, generalo, diplomato, demono, egoisto, renegato, komisaro, prezidento, kelnero, komizo, indiĝeno, oficiro, giganto, koko, vermo, cimo.

3. Klarigu, kion signifas la subaj vortoj:

Ekrespekti, ekbaki, ekversi, ekstermi, ekfrapi, ekkoleri, ekkompati, ekzerci, ekkirli, ekplori, ekzili, ekluli, ekfulmi, eksalto, ekskurso, eksfianco, ekssoldato.

4. Laŭ la modelo: *pri + R(radiko) + inda* (ekzemple : priplorinda), **formu kelkajn vortojn.**

5. Laŭ la modelo: *skribotablo* (= tablo por skribo), **formu kelkajn vortojn.**

6. Ĉu ne ŝajnas al vi, ke la sekvaj propraj nomoj estas Esperantaj vortoj? Se jes, **provu klarigi ilian signifon:**

Marko; Modesto, Julio, Romano; Klara, Flora, Roza, Marta, Frida, Ada, Ida; Leonido, Leonardo, Gustavo, Teodoro, Filipo, Emilo; Amalia, Oksana, Elvira; Homero, Priamo, Voltero, Bonaparto, Salomono.

7. Transformu ĉiujn taŭgajn vortojn el la teksto en vortojn kun la prefikso *mal-* (ekzemple : nokto – maltago, piedoj – malmanoj, moderna – malantikva, jes – malne); ne gravas, ke multaj vortoj aspektos strange kaj amuze; gravas, ke ili estu formitaj regule.

8. Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj:

Humoro – humuro, kolo – kolego, kreto – kreteno, piki – peki – pekli, fonto – fondo – fundo – profundo.

9. Elektu vorto(j)n laŭ via plaĉo:

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen *(kialo, moralo, falo, batalo, signalo).*

Matena horo estas plena de *(laboro, angoro, doloro, memoro, amoro, ploro, oro, favoro, fervoro).*

Ne ŝovu la nazon en fremdan *(kazon, bazon, emfazon, razon, vazon, frazon).*

Aliaj domoj, aliaj *(legomoj, aromoj, fantomoj, homoj, diplomoj, nomoj, komoj).*

Al Dio plaĉu, sed pro diablo ne *(kriaĉu, parolaĉu, kraĉu, klaĉu).*

10. Finu la frazojn:

Aĝo tro matura ne estas.... .
El malplena telero vane ĉerpas... .
Eĉ stono verdiĝas, se ĝi longe ne... .
De la majesta ĝis la ridinda estas nur unu... .
Kapo majesta, sed cerbo... .
Por malfrua gasto restas nur... .
Se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la... .
La plej bona gvidilo estas la... .
Ankaŭ al nia nesto venos iam la... .
Kiu aŭskultas, kie li ne devas, tiu aŭdas, kion li ne..

11. Metu po unu vorton anstataŭ la tripunkto:

Kun kiu vi... , tia vi estas.
Kio nin ne... , kuŝu kiel kuŝas.
Kie lumo ekzistas, ankaŭ... troviĝas.
Ebrieco pasas post dormo, ... pasas neniam.
Kien kudrilo iras, tien... ĝi tiras.

Per vorto... ĉio estas facila.
Ĉiu vulpo sian... laŭdas.
Hundo... , homo vojas.

12. Al la frazpecoj el la unua grupo trovu daŭrigon en la dua grupo:

Kiu frue leviĝas,	sian barbon submetas.
Kiu rabi eliras,	malbone odoras.
Kiu supren kraĉoas,	facile riĉiĝas.
Kiu mem sin gloras,	mensogas sentime.
Kiu mensogas kutime,	ofte nuda revenas.

13. Elpensu laŭeble multe da esprimoj, en kiuj la vorto verda havas nerektan sencon (ekzemple: *verda patrioto, verda broŝuro* ktp).

14. Ŝanĝante lokon de la vortoj en la frazo, faru laŭeble multe da frazoj, kiujn vi opinias bonaj. Atentu sanĝiĝon de la senco de la frazo:

Morgaŭ matene mi trinkos kafon.

15. Faru kelkajn variantojn de reklamo (oficiala, serioza, multpromesa, gaja, amuza ktp) pri malfermo de nova Esperanto-kurso.

16. Temo por diskuto aŭ rakonto: *Ne doloras frapo sur fremda kapo.*

17. Rakontu pri via vera aŭ imaga vojaĝo al iu lando (eble, tre malproksima) kun helpo de Esperanto. Priskribu diversajn okazojn, kiam Esperanto kaj esperantistoj helpis al vi fari viajn feriojn pli agrablaj.

18. Klaĉante pri via najbar(in)o, rakontu pri li/ŝi la plej nekredeblajn aferojn.

19. Rakontu gajan historion el via vivo aŭ la vivo de via konato.

20. Imagu, ke vi estas vokita al policejo kiel atestanto de iu okazo: Priskribu viajn informojn de atestanto.

21. Imagu, ke antaŭ kelkaj tagoj en vian urbon venis per tempomaŝino grupo da antikvaj romianoj. Priskribu iliajn aventurojn.

22. Imagu, ke vi jam dum kelkaj monatoj posedas poŝan telefonon, per kiu vi povas senprobleme komuniki kun ajna loko de la planedo. Prezentu kelkajn neordinarajn telefonajn konversaciojn (ekzemple, kun mondfama kantisto dum koncertpaŭzo, kosmonaŭto en kosma ŝipo; ĉefo de afrika gento; ĵus forigita ŝtatestro, aliplanedano sur fluganta "telero").

23. Provu mem verki skizon de lingvo-projekto. Se vi sukcesos, donu al ĝi belan nomon, – tio estas la plej grava por trafi en la senfinan liston de provoj krei projekton de internacia lingvo. Se ankaŭ tion vi sukcesos, skribu en via lingvo ardan am-leteron. Se ĝi placos al via amat(in)o, provu verki vialingve versaĵon aŭ traduku en ĝin vian plej ŝatatan nacilingvan versaĵon.

24. Imagu, ke en landa Esperanto-Kongreso vi estas proponita kiel unu el kandidatoj por la posteno de prezidanto de la landa Esperanto-asocio. Verku vian programan paroladon, kiu estu laŭeble ne nur profund-enhava, sed ankaŭ bonstila oratoraĵo, ornamita per trafaj stilaj figuroj.

d-ro Boris KOLKER
ab. jaŝ. 1125, RUS-450025 Ufa

La libro mem aĉeteblas ĉe la Libroservo de UEA.

Recenzoj pri pedagogiaj verkoj

Superrigardo de la lernejaj eksperimentoj

Al nova internacia lingvopolitiko: La propedaŭtika valoro de Esperanto, de Edward Symoens. UEA, Roterdamo 1992. Numero 28-29E en la serio *Esperanto-dokumentoj*. 21cm. 44p. ISSN 0165-2524.

Ĉi tiu verko de la antaŭa prezidanto de nia Ligo kompilas en unu konciza dokumento la ĝisnun plej kompletan listigon de lernejaj eksperimentoj celantaj pruvi la valoron de Esperanto en la kresko de lern-kapablo de aliaj fremdaj lingvoj. La ĝenerala enkonduko havas du sekciojn. La unua skizas la socipolitikan aspekton de lingvoj – la ligon inter lingvo kaj kulturo kaj etna identeco kaj la kreskanta bezono por internacia komunikado. La dua proponas novan modelon kaj vojon por la lingva konduto de homoj en estonta mondo, en kiu Esperanto prenos esencan rolon.

La dua ĉapitro argumentas teorie por la propedeŭtika valoro de Esperanto, provante montri *kial* studo de ĝi povas rapidigi alproprigon de aliaj lingvoj. Por fari tion ĝi ĉefe apogas sin sur citoj de konataj pedagogoj: prof. d-roj Helmar Frank kaj István Szerdahelyi, Helmut Sonnabend kaj Maria Majerczak.

La tria ĉapitro detale skizas la klopodojn akiri en la dudekaj jaroj oficialan agnoskon de la Ligo de Nacioj, citante proponojn, manifestojn kaj verdiktojn.

La kvara parto listigas dek kvinon da lernejaj eksperimentoj, donante pri ĉiuj resumon de la celoj kaj konkludoj. Tiuj estas Bishop Auckland, Britio, 1918-1921; Auckland, Nov-Zelando, 1922-24; Wellesley Kolegio, Usono, 1924; Universitato Columbia, 1925-31; Nov-Jorko, Usono, 1934-35; Sheffield, Britio, 1947-51; Manĉestro, Britio, 1948-64; Munkeno, Germanio, 50-aj jaroj; Somero, Finnlando, 1958-63; Universitato Eötvös Lórand, Budapeŝto, 1962-63); Kvinlanda ILEI-eksperimento, 1a regiono (BG,H,I,YU), 1971-74; 2a regiono (B,F,GR,D,NL) 1975-77; Paderborno, Germanio; 1975-85; italaj elementaj lernejoj, 1972-73 kaj 1983-1988.

Same valora listigo estas impona naŭ-paĝa bibliografio prezentante titolojn pri la temo kaj la eksperimentoj en Esperanto kaj pluraj naciaj lingvoj.

Sume, nemalhavebla verko por iu ajn, kiu volas starigi propran eksperimentan klason, esplori la terenon, aŭ konvinki edukajn instancojn pri la valoro de Esperanto. Pli frua kaj ampleksa versio de ĉi tiu teksto jam aperis itale; traduko al aliaj naciaj lingvoj bonvenaj: kontaktu la aŭtoron (adreso dors-kovrile).

Mendu de la Libroservo de UEA: 4,80 NLG (po 3,20 ekde 3 ekzempleroj). La serio *Esperanto-dokumentoj* estas abonebla: 46,00 NLG por dek sinsekvaj titoloj.

smg

Kvar jarcentoj – Komenio. Esperantlingva versio de la nederlanda publikaĵo **Vier eeuwen – Comenius** de Klaas PIT kaj Bert STILMA, tradukita de Zsuzsa BARCSAY, lingve kontrolita de Hermann BEHRMANN. La nacilingvaj versioj (nederlanda, pola, ĉeĥa, hungara) estas mendeblaj ĉe Comenius College, Bisonlaan 1, NL-1217-GH Hilversum, la Esperanto-versio ĉe Esperanto-Centro, poŝtfako 1450, D-W-4790 Paderborn.

La broŝuro ampleksas 38 paĝojn A/4 kaj enkondukas la leganton en la vivon, iniciatemon, farojn, konvinkojn kaj revojn de la „vere historia" Komenio, „kiu siajn kapablon kaj spiritan riĉecon konsideris ricevitaj de Dio ..." (p.18). Prilumigante la kruelaĵojn de la mezepokaj eŭropaj landoj, la aŭtoroj samtempe intencas konsciigi la suspektindan similecon kun la nuntempa ĥaosiĝo en la homa socio eĉ en la unuiĝanta Eŭropo. Ili atingas tiun ĉi celon pere de subtilaj aludoj (ekzemple: „Estis terura kutimo tiutempe, ke oni pereigis la alimaniere pensantajn homojn, aŭ ke oni tiel timigis homojn pensi alimaniere." (p.8) aŭ pere de demandoj ĉapitrofine respektive al la multaj bildoj, desegnaĵoj, tabeloj, kiuj trafe ilustras la rakonton.

El la granda verko de Komenio estas tuŝataj tre instigaj por disputado inter samklasanoj pensoj, proponoj, projektoj kaj praktikaj provoj, i.a. lia komparo inter la kvarspecaj lernejoj kaj la kvar sezonoj (p. 23, el „La granda didaktiko") aŭ lia sistemigo de la fenomenoj por pliraciigi la lernprocezon (p. 25/26, el „La mondo de percepteblaĵoj en bildoj").

Diference de la nacilingvaj eldonoj la Esperanto-versio estas pliriĉigita per aparta, tria ĉapitro, kiu titolas „Komenio kaj la internacia lingvo" (laŭ la samtitola kajero de Oldrich KNÍCHAL), kaj per aludoj pri la Zamenhofa inventaĵo en la kvara ĉapitro, „Kvarcent jarojn poste".

La libreto tre taŭgas kiel morale instrua legaĵo en junularaj grupoj kaj liveras multajn instigojn al memedukado en nia mondo, ne multe pli humaneca ol tiu de Komenio: „Sur ĉiu nivelo: de la loka ĝis la universala oni devas observi, kiel estas gvidebla la homa kunvivado de la pereo al la renoviĝo." (p. 35, el „Ĝenerala konsultiĝo pri plibonigo de la homaj aferoj".).

La legado fluas pro la poluriteco de la Esperanto-lingvaĵoj, kelkloke ili eĉ ŝajnas poezieski. Tiu ĉi impreso estas elvokata prefere en esprimoj kaj frazoj kun ŝanĝo de la kutima aŭ atendata vortordo (ekz. maro Balta, monto Blanka, tiel renkontis Komenio unuafoje Nederlandanojn), nur en unu kazo la inversio malhelpas la tujan ĝustan komprenon: „Unu el la ĉeestantaj ses pastoroj mi ordinaciis senioro" (p. 16).

La ekkono/rekono de derivaĵoj de propraj nomoj estas plifaciligata per konsekvenca majuskligo de la komenca litero (Kristano, Pola astronomo, Greka lingvo, duon-Hungara deveno), sed la neapliko de kuniga streketo post substantiva flankelemento kun konservita finaĵo iomete bremsas la ekkapton de la senco (princoj protestantoj, profesoroj sciencistoj).

Per alvoko al la leganta junularo sendi al Esperanto-Centro Paderborn eseojn, desegnaĵojn, muzikaĵojn, fotojn ktp. rilatantajn al vivofilozofiaj demandoj en la fino de la kvara ĉapitro, la publikaĵo *Kvar jarcentoj – Komenio* denove rekomendas sin kiel instiga, sent-eduka legaĵo en grupoj, kiuj strebas al interhoma pacama komunikado.

d-ro Till DAHLENBURG

"Seks"–peranta lernilo.

János SÁRKÖZI.: **Adamo kaj Eva** Malgranda romano por komencantoj. Debrecen: Debrecena Bulteno; 1993. Ilustrita de Peter Peter. 21 x 15 cm, 42 pĝ. Prezo: 50 HUF.

Legaĵo: Kun la ŝablona titolo *Adamo kaj Eva,* la aŭtoro verkis romaneton, kies celo estas servi kiel legaĵo por komencantoj. Ĝi estas banala amrakonto pri Eva, 17-jara lernantino kaj Adamo, 19-jara gastlaboristo. La landoj de la du rolantoj ne estas menciitaj, do la intrigo ŝvebas en nereala ĉirkaŭmedio. Eva, kiu scias Esperanton, hazarde renkontiĝas kun Adamo, kiu komprenas nur sian gepatran lingvon. La unua tasko de Eva estas instrui Esperanton al Adamo, por ke ili povu interkomunikiĝi. Adamo komencas lerni la lingvon, sed li pli interesiĝas pri Eva kaj provas delogi la junulinon por kontentigi siajn seksajn dezirojn. Lia unua provo seksumi kun ŝi en arbaro fiaskas, ĉar Eva rezistas. Kiam la gepatroj de Eva forveturas, ŝi invitas Adamon en sian loĝejon, kie li sukcesas amori ŝin. La rakonto finiĝas, kiam, post kelkaj semajnoj, Adamo forlasas Evan por reiri al sia hejmlando.

La temo de tiu ĉi triviala erotikaĵo karakterizas revuon kiel *La Kancerkliniko* sed tute ne estas kutima por Esperanto-lerniloj. Ĝi neniel konvenas.

Vortprovizo: La aŭtoro uzas kiel votrprovizon la Bazan Radikaron Oficialan, ellaboritan de Akademio de Esperanto. Inkluditaj estas 400 radikoj el la tri unuaj oftecgrupoj, kompletigitaj per 700 vortoj el la kvin unuaj oftecgrupoj. Vortoj ne troviĝantaj en tiu listo kaj ne analizeblaj kiel kunmnetaĵoj de tiuj vortoj, estas klarigitaj fine de la mallongaj ĉapitroj kaj ankaŭ sur du paĝoj post la vortoj de la Baza Radikaro. Kritikindaj estas la malprecizaj difinoj, kiujn ricevas tiuj vortoj. Ekzemple *robo* estas "virina vestaĵo", *vango* estas "vizaĝo" kaj *vortaro* estas "libro, en kiu estas vortoj".

La lernilo estas uzebla por instruado laŭ la rekta metodo, ĉar la tuta teksto estas en Esperanto, kaj ne estas traduko de la vortoj. Sekve, lernanto devas akiri Esperantan-etnolingvan vortaron.

Lingvouzo: En la libro troviĝas lingvaj eraroj, kiuj malalatigas ĝian valoron por didaktikaj celoj. La aŭtoro, estante denaska parolanto de la hungara lingvo, ne ka-pablas liberigi sin de la katenoj de tiu lingvo, kiam li verkas en Esperanto. Estas evidente, ke la teksto ne estis reviziita fare de lingve kompetenta

esperantisto, kiu ne estas parolanto de la hungara. Kelkaj trajtoj de "hungar-esperanto" estas: ellaso de subjektaj pronomoj en subordaj propozicioj; slaveca traduko de la hungara konjunkcio *hogy* per "ke", kiam ĝi estas superflua en Esperanto; traduko de *ha* per "se", kiam la senco estas "kiam"; nekutima vortordo rezultanta de pensado en la hungara kaj skribado en Esperanto. Tiu ĉi speco de etnolingve influita Esperanto estas riproĉenda en lernilo, ĉar ĝi prezentas malbonajn modelojn por imitado. Pli severa kritiko koncernas gramatikajn erarojn en Esperanto, ĉar ili misgvidas lernantojn. Se la regulo pri la refleksivo en Esperanto klare malpermesas ĝian uzon en la subjekto de frazo, kial skribas Sárközi "Hejme, siaj amikoj ĉiam diris..." ? Kial aperas la akuzativo post verbo ne signifanta almovon: '... skribu la nacilingvan tradukon post ilin'? (La sekva frazo tekstas jene: '... skribu la nacilingvajn vortojn post la esperantlingvaj' !!!). Eĉ pli nekonsekvenca estas la traktado, kiun la aŭtoro donas al la prepozicioj 'sur' kaj 'je': (1) 'ŝi mane montris sur sin'; (2) 'ŝi montris je si'; (3) 'ŝi montris je sin'!!! En la sekva frazo la uzo de la participa adverbo 'sidante' estas erara, ĉar ne ekzistas persono en la subjekto: 'Sed la komunaj promenadoj, paroladoj, sidante sur benko en parko jam estis ne sufiĉaj'.

Takso: Krom la ĉi-supre menciitaj difektoj, ankoraŭ unu granda mispaŝo estas la intenca aperigo en la teksto de ekzemploj de nenorma lingvouzo. Temas pri fuŝe formitaj frazoj kun multaj gramatikaj eraroj, kiam Adamo komencas lerni Esperanton, kaj en ripeto de telefona konversacio kun balbutanta eterna komencanto. Estas baza principo de la eduka psikologio kaj metodologio, ke oni neniam prezentu erarojn al lernantoj, ĉar tio havas kontraŭpedagogian efikon. En lingvoinstruado, ĉiam devas esti antaŭ la okuloj kaj oreloj de lernantoj la internacia, ĝusta normlingvo. Sekve, ne estas eble rekomendi **Adamo kaj Eva** kiel lernilon por la instruado de Esperanto.

Bernard GOLDEN

Reago: Mi devas esti tre danka al sinjoro akademiano Bernard GOLDEN, ja li aperigas skribaĵojn samtempe en pluraj esperanto-gazetoj, do li faras grandan senpagan reklamon por mia romaneto.

Koncerne la esencon de la kritiko, mi estas fiera, ja tiu tre modesta erotikaĵo, kiu okupas ĉ. 7 procentojn de la tuta romaneto, el la permesitaj 700 tute decaj vortoj, estas verkita tiel fascine, ke post la finlego, sinjoro Golden memoras nenion alian, eĉ tion ne, ke preskaŭ la tuta romaneto sugestas, ke korpa kontakto sen strikta anima kunligo, sen vera granda amo valoras nenion. Sincere, iom mi timis, ke kritikontoj riproĉos ties didaktikan ripetadon.

Mi pensas, ke demonstro de kelkaj false skribitaj vortoj, frazoj estas ne granda kulpo kontraŭ pedagogiaj principoj. Mi tre dankas la kolekton de preseraroj, eĉ gramatikaj malkorektaĵoj, hungarismoj; tio helpos en la plibonigo de la sekvontaj eldonoj.

Kara leganto, mi petas vin finlegi la romaneton; tio bezonos nur tri horojn – eble ili estos ne enuigaj – kaj vi mem decidu, kiu pravas. János SÁRKÖZI

28a ILEI KONFERENCO
kaj 3a GIMNAZIO DE ILEI

Universitato Kangnam
Yongin-gun, Kyonggi-do, Koreio
30a julio — 5a aŭgusto 1994

La Universitato Kangnam situas 30 kilometrojn sude de la ĉefurbo Seulo kaj disponigas modernajn faciligojn. Konferencanoj povos komune veturi al Kangnam per aŭtobusoj de la universitato fine de la Universala Kongreso.

Loka Konferenca Komitato: d-roj SO Ĵin Su, SO Gilsu, GIM Inhong, GUAK Ĵonghun kun universitatanaj helpantoj d-rino YANG Oknam kaj d-ro GIM Dong-on.

Temo: La azia kontribuo al tutgloba edukado kaj kulturo. Estas pretigita prelego 'Kompara studo pri la eduka pensado de Yulgok Yi (1536-84) kaj Komenio.' Ni esploros faktorojn kiel la gepatra entuziasmo por edukado en Koreio, Japanio kaj aliaj aziaj landoj. Ni informiĝos pri lingvo-instruado en tiuj landoj, kaj specife kiujn strategiojn oni uzas kaj malfacilaĵojn oni spertas instruante Esperanton.

La lando: Koreio estas dinamike evoluanta lando, kun frapaj kontrastoj inter tradicio kaj progreso. Ĝia grandeco estas 99.200 kvadrataj kilometroj (samgranda kiel Hungario, ekzemple) kun 44 milionoj da enloĝantoj, el kiuj 11 milionoj vivas en la ĉefurbo Seŭlo. 1994 estos speciala festa jaro, pro la 600-jara datreveno de la proklamo de Seŭlo ĉefurbo. Sepdek elcentoj de Koreio estas monta, pluraj partoj de la lando ofertas ravajn naturajn pejzaĝojn. La somera klimato estas varma kaj humida, kun pluvo atendebla.

La lingvo: La korea estas membro de la Ural-Altaja lingvo-familio, kaj havas dek vokalojn kaj dek kvar konsonantojn. Ĝi estas skribita per propra plene fonetika kaj facile lernebla alfabeto, konscie kreita en 1443.

Vizoj: Vizitantoj kun reven-biletoj rajtas ĝenerale resti ĝis 15 tagoj sen vizoj. Tamen, por partopreni kaj UKon kaj la konferencon, la plimulto de vizitantoj bezonos vizojn.

Mono: La monunuo estas la ŭono, indikita per 'W'. Ĉirkaŭ 800 ŭonoj egalas usonan dolaron, 450 nederlandan guldenon.

Gimnazio: En urbo Degu troviĝas pli ol cent lernantoj de Esperanto en superaj mezlernejoj. Antaŭvideblas, ke 30 ĝis 40 el ili volonte partoprenos gimnazian semajnon, tiel ke la tria gimnazio povus esti la plej granda ĝis nun, kaj krome la konferencanoj havos unikan eblecon konstati, kiel aziaj studentoj alfrontas lernadon kaj uzadon de eŭrop-devena fremda lingvo.

Partopreno: La nombro de niaj membroj povontaj vojaĝi el Eŭropo estos verŝajne limigita, sed instruistoj el Koreio, Kanado, Usono, Japanio kaj Ĉinio estas atendataj. LKK speciale laboras por faciligi la vojon al grupo de dudeko da ĉinaj instruistoj. Ni informos pri flug-karavanoj al Koreio.

Ekskurso: La tut-taga ekzkurso antaŭvideble inkluzivos viziton al la unika folklora subĉiela vilaĝa muzeo, kie ĉiuspecaj tradiciaj artformoj (ceramiko, dancado, manlaborado ktp.) estas demonstrataj en aŭtentika etoso.

Loĝigo: Malkiel kutime, ni devos oferti diversajn kategoriojn da loĝigo kaj uzi loĝejojn najbare al la Universitato Kangnam. La universitato disponigos uzon de siaj aŭtobusoj por faciligi la veturadon. Nur indikajn, orientigajn prezojn ni povas nun doni pri kvin kategorioj, LKK plue serĉas pliajn eblecojn. Ni fine ofertos nur limigitan nombron da alternativoj, por ke ni kiel eble pleje povu komune loĝi. Pro la neceso frue plani la konferencon, kaj scii, kiuj kategorioj estas preferataj, ni petas sinanoncajn kaj nedevigajn aliĝojn jam nun. Aliĝintoj ricevos firmajn informojn kun loĝmendilo tuj kiam eble.

Loĝigo en studenta hejmo (8-litaj ĉambroj)	140 USD	220 NLG	880 SEK
Loĝejo de socia asocio (4-litaj ĉambroj)	280 USD	430 NLG	1720 SEK
Loĝigo en korestila gastejo (2-litaj ?)	240 USD	380 NLG	1520 SEK
Loĝigo en modesta hotelo (2-3 stela)	360 USD	600 NLG	2400 SEK
Loĝigo en hotelo (3-4 stela)	420 USD	700 NLG	2800 SEK

Manĝoj estos ĝenerale kore-stilaj kaj ofertataj ĉu en loĝejoj, ĉu en la universitato. Okcident-stilaj manĝoj estos proponeblaj nur en pli luksaj hoteloj.

La supraj indikaj kotizoj kovras loĝigon, tri manĝojn tage kaj la programon (sed ne ekskursojn). Ili validas por loĝantoj de okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio kaj Aŭstralazio. Loĝantoj de aliaj landoj ĝuas mildigon de 25%. Studentoj kaj instruistoj de la gimnazio ĝuas rabaton de 20% de la kotzio por sia loĝlando.

Pagoj eblos la kasisto de ILEI aŭ tra UEA. Koreanoj povos pagi enlande en ŭonoj. Reform-eŭropanoj povos pagi en forintoj al la hungara ILEI-sekcio aŭ en slovakaj kronoj al Esperanto-Centro Poprad laŭ anoncotaj sumoj. Bonvolu pagi nur post anonco de la definitivaj kotizoj kaj pagmanieroj..

ALIĜILO: 28a KONFERENCO kaj 3a GIMNAZIO de ILEI

Kangnam, Koreio ; sabate 30 julio — vendrede 5 aŭgusto 1994

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-292 94 Hörby, Svedio. Bv. plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu persono.

Mi aliĝas al la: Konferenco _____; Gimnazio: _____

Familia nomo: ..... Antaŭnomo: .....

Profesio: ..... Sekso: ..... Naskiĝdato: .....

Kompleta poŝta adreso: .....

.....

____ Mi preferos loĝi en studenta hejmo (8-litaj ĉambroj)

____ Mi preferos loĝi en loĝejo de socia asocio (4-litaj ĉambroj)

____ Mi preferos loĝi en kore-stila gastejo (verŝajne 2-litaj ĉambroj)

____ Mi preferos loĝi en modesta hotelo en _____-lita ĉambro.

____ Mi preferas loĝi en mezklasa hotelo en _____-lita ĉambro.

Mi POVOS / NE POVOS manĝi kore-stilajn manĝojn. *(forstreku nevalidan)*

____ Mi deziras manĝi vegetare.

____ Mi havas alian dietan aŭ loĝigan bezonon, nome: .....

.....

____ Mi volonte kontribuos al la programo per: .....

.....

Mi interesiĝus pri C-grada Cseh-smeinario: jes/ne

Mi interesiĝus pri sesio de la UEA/ILEI ekzamenoj: elementa/ meza

Mi pagos la kotizon al ..... en valuto.....

____ Mi partoprenos la Universalan Kongreson en Seŭlo. jes/ne.

Subskribo: ....Dato: .....Loko: .....

POR GIMNAZIAJ KANDIDATOJ:

Mi aparte interesiĝas pri:.....

.....

Mi proponas por la gimnazio programeron: .....

.....

Mi volonte adaptiĝos al la normala disciplino de la Gimnazio.

Subskribo: ....Dato: .....



ILEI-KONFERENCO UNUAFOJE EN AZIO!

Amikeco trans la markolo

Trideko da infanoj kaj junuloj inter la aĝoj de 7 kaj 16 partoprenis renkontiĝon en Kolĉestro (Colchester), en sud-orenta Anglio en marto 1993. Tri junuloj el Nederlando vojaĝis trans la markolon por spici la aranĝon per internacieco.

En la programo, elpensita de s-ino Ann Morse-Brown kaj s-ino Angela Tellier, estiĝis kvin rondoj, kies gvidantoj devis instrui specifan arton, ĉiam per Esperanto: temis pri marionetoj, surmuraj pentraĵoj, ceramiko, pilkoĵonglado kaj distraĵo. Unu el la partoprenintoj jene rakontis:

"Tre specialaj estis la komunaj ludoj. Mi memoras unu, dum kiu la kasedilo produktis sonojn de bestoj, veturiloj, muzik-instrumentoj ktp. Ĉiu grupo disponis pri tabulo, kies bildoj harmoniis kun kelkaj sonoj. Gajnis la grupo, kies bildo-sonoj ĉiuj aŭdigis unue. Alia ludo nomiĝis 'ŝarado'. Temis pri prisilentataj vortoj, kiuj estas

ESPERANTO aldonas multajn geamikojn

"Kiam ĉiu popolo estas sendinta al la Unuiĝintaj Nacioj delegiton Esperanto-parotantan, tiam ĉiu povas kompreni la alian. Tiam miskomprenoj ne ekzistas, kaj la angloj ne plu havas antaŭecon". La 12-jara Tjeerd van Sas, lernanto de la lernejo "Sankta Jozefo en Heemskerk, evidente pripensis, kial Esperanto povas esti tiel grava. Kune kun lia 10-jara samklasano Quoc-luong Truong, kiu nun vizitas la lernejon "Dumastuló en Beverwijk, kaj kun la 11-jara samklasano Iwan Bostdorp, li pasintsemajne forveturis al Colchester (Essex, Britio). Tie okazis internacia renkontiĝo de infanoj, kiuj kapablas komprenigi sin per Esperanto.

Quoc, Iwan kaj Tjeerd triope partoprenas la progresigan kurson de la Esperanto-instruisto Ton Verwoerd. Sed tiun lingvon ili parolis ne dum la tuta semajnfino. "Estas vere ke tio estis devo, sed ni ankoraŭ ne sufiĉe regas ĝin. Dum la paŭzoj ni parolis la anglan, sed la ludoj okazis esperantlingve," Iwan diras. Esperanto aldonis multajn geamikojn. Iwan: "Ĉeestis instruisto pri matematiko de lernejo en Southampton; ni instruis al li la nederlandan lingvon kaj iun kartludon, nome batalludon. Nun li intencas instrui tion al siaj gelernantoj."

La knaboj komencis eklerni la lingvon pro nura scivolemo. Kiei ununura lernejo en la regiono "IJmond'; la lernejo Sankta Jozefo prezentas tiun eblon. S-ro Verwoerd: "Unufoje ĉiusemajne mi instruas al la infanoj Esperanton en mia hejmo dum unu horo kaj duonó. La tri lernantoj intencas provizore daŭrigi la Esperanto-kurson. "Estas ja plezurige, do se ni havos sufiĉe da tempo, ni daŭrigos ankau en la mezlerneja periodó.

Antaŭ iom da tempo la knaboj jam aliĝis al la Kastora Klubo, klubo de infanoj el la tuta mondo, kiuj kontaktas unu kun la alia pere de korespondo kaj la kluba revuo *Kara Amiko*. Tjeerd: "Mi korespondis kun germana viro, sed pasintjare li mortis, kaj korespondi kun kadavro ne eblas".

La lernantoj povas perfektigi sian Esperanton, akirante gradojn kaj diplomojn. Quoc, Iwan kaj Tjeerd jam akiris la unuan. "Ni akiris la gradon de Kastoreto. Por tio oni devas promesi fari sian eblon, lernante Esperanton, kaj konsideri ĉiun en la tuta mondo kiel sian amikon", Quoc diras. Esperanto estas pli ol nura lingvo, ĝi estas speco de ideologio. Tjeerd: "Ankaŭ la himno temas pri amikeco inter vilaĝoj kaj urboj". La infanoj ankaŭ esperas, ke ĉiu en la mondo ekparolos Esperanton. Verwoerd:"Esperanto nepre ne sensence signifas: Homo kiu esperas".

divenendaj en grupo laŭ desegnitaj bildoj. Plej ŝatata estis la ludo kun la ĵetkubo: kiam oni ĵetis seson, oni devis surmeti ĉapon, veŝton kaj ganton, kaj tiel vestite tranĉi kaj formanĝi iom da kuko... ĝis kiam aliulo ĵetis seson kaj tuj transprenis la taskon (ĉiam tro frue!) Ekestis ofte emociaj rideksplodoj kaj tumultaj spektakloj!"

La aranĝo inkluzivis viziton al kastelo, kun admiro de romiaj trezoroj. La nederlandanoj konservis fortajn memorojn pri la tuto, kaj intervjuiĝis por loka gazeto: *Dagblad Kennemerland* kun la apuda teksto akompanata de foto de la tri junuloj. Kiu volas kontakton kun la nederlanda grupo (kiu eldonas regulajn novaĵleterojn) skribu al: s-ro Ton Ve rwoerd, Sint Josephschool, Postbus 78, NL-1960 AB Heemskerk, Nederlando.

Okulume tra niaj sekcioj

Esperanto Teacher,
n-ro 171, somero 1993.
(organo de nia brita sekcio)

Ĝia ĉefa novaĵo estas nebona. En la lastaj jaroj unu el la ekzamenaj estraroj (la norda) de la nova nacia ekzamena sistemo GCSE (General Certificate of Secondary Education: Ĝenerala Atesto de Duagrada Edukado) oficiale allasis Esperanton. Tio estis granda atingo en lando, kie la ĝenerala sinteno al Esperanto ne estas tro favora. Ĉiujare manpleno da kandidatoj sukcesis en ĝi.

Sed en letero de la 29a de marto 1993, la tem-oficisto por modernaj fremdaj lingvoj, s-ro Graham George, en la nomo de la Norda Ekzamena kaj Pritaksa Estraro (Northern Examinations and Assessment Board) indikis per cirkulera letero al ĉiuj koncernatoj, ke ekde 1995, Esperanto ne plu estos allasata. Ĝia sola argumento estas la seniluziige malalta kaj malkreskanta nombro da kandidatoj.

La bulteno proponas diversajn rimedojn kontraŭstari tiun decidon, unue petante klarigon pri la nombro da kandidatoj por aliaj maloftaj ofertataj lingvoj. Sed pli fundamenta solvo estas solida agado por altigi la kvanton da instruado kaj sekve la nombron da eblaj kandidatoj. Lige kun tio *Esperanto Teacher* vidis la valoran rolon de la instruistaj kursoj de ILEI, kaj rekomendas al siaj membroj partoprenon.

La numero raportis detale pri la junulara semajn-fino en Kolĉestro (vidu aliloke en IPR), represis la pedagogian kalendaron el IPR (brava iniciato, estas ja tre temporaba laboro pretigi tion — kial ni faru tion plurfoje?) kaj detale raportis pri nia estrarkunsido de Budapeŝto.

ILEI esploros, kion ĝi povos fari en la kampanjo ŝanĝi la decidon pri Esperanto.

Esperanto kaj instruado.
1/93 aprilo
(organo de nia germana sekcio)

anoncas la jarkunvenon de AGEI en la 71a Germana Esperanto-Kongreso en Karlovy Vary, Ĉeĥio. Tio intertempe okazis, kun la rezulto, ke nia propra estrarano, d-ro Till Dahlenburg elektiĝis vic-prezidanto de GEA, kune kun kies aliaj estraranoj, li planas seriozan partoprenon en ne-movadaj edukaj konferencoj kaj aranĝoj (vidu IPR 93/1). Ni gratulas, kaj esperas, ke la internacia laboro de ILEI pli proksime plektiĝos kun la eduka laboro de GEA.

NGGE sciigas
n-ro 35, junio 1993
(organo de nia nederlanda sekcio)

anoncas gravajn ŝanĝojn en la estraro de NGGE okazintaj en la jarkunveno en marto 1993. Post 12-jara funkciado la sekretario (kaj sekciestro) s-ino Luesken-Burger eksiĝis, transdonante provizore la funkcion al la kasisto, s-ro Hans Ten Hagen. Nova estrarano estas s-ino Nora Grooten (pionira sukcesinto en la UEA/ILEI ekzamenoj dum la IJK en Kerkrade unu jaron post nia konferenco tie.) S-ro Hoekstra, post simile multjara laboro, transdonas al s-ro Ten Hagen la redaktadon de la sekcia bulteno.

La kunsido proponis al ILEI starigi fondaĵon por subteni junulojn dezirantaj partopreni la ILEI-gimnazion, aŭ allasi Fondaĵon Szerdahelyi tiucele. La movado jam dronas en inundo da fondaĵoj, ni uzu la ekzistantan fondaĵon por tio. Efektive, ni ja uzos ĝin por kovri kostojn de la ĉi-jara direktoro, kaj ni uzas la fondaĵon ĉe s-ro Olsson en Svedio por permesi la partoprenon de unu rumana junulino. Tamen la alvokoj por subvenciado aŭ investo al ILEI aŭ ĝia fondaĵo (de ELTE universitato, Esperantro-Centro Poprad, kaj stipendioj por instruistaj kursoj) jam superas iliajn elpagajn kapablojn!

La gazeto prezentis detalan raporton pri la seminario pri fremdlingva instruado okazinta komence de aprilo el Schoorl, kaj anoncas studo-tagon en Hago, sabaton la 9an de oktobro 1993 en la sidejo de IEI, Riouwstraat 172, Den Haag, de la 10a ĝis la 17a horo. Ĉefa gasto estos s-ro Andrzej Pettyn, redaktoro de la programoj de Pola Radio.

Bulteno de AAIE
Aprilo 1993
(organo de nia nordamerika sekcio)

anoncas, ke la jarkunveno de AAIE okazos en la ELNA-kongreso ĉe la Universitato de Hartford, Connecticut, la 17an-18an de julio.

raportas, ke 105 el la membroj de ELNA (ĉ. 10%) havas adresojn en komputilaj retoj kiaj CompuServe, Internet, Usenet, Bitnet, FidoNet, America Online, Genie, Prodigy, ktp.

Samteme estas anoncite, ke de UEA kontraŭ 5,40 NLG oni povas ricevi 36-paĝan liston de pli ol cent komputilantoj el 24 landoj.

Denove okazos prezentoj de Esperanto en la konferenco de la Modern-Lingva Asocio, okazonta en Toronto, Kanado, 27-30 decembro 1993. Prelegos d-ro Duncan Charters "Implicoj de teknologio por lingvolernado kaj instruista trejnado ĝenerale kaj por Esperanto specife" kaj d-ro Richmond "Uzado de komputile storita parolo en distanc-alira lingvo-lerna sistemo."

kompilis: smg

• *Traduk-ĝardeno* estas la titolo de serio da eldonaĵoj de nia ĉina ILEI-sekcio. Ĝia celo estas unuflanke prezenti ĉinajn poemojn kun modelaj tradukoj en Esperanto, aliflanke preni ekzistantajn poemojn en Esperanto (ĉu originalaj, ĉu mem tradukoj el aliaj naciaj lingvoj, kaj liveri ĉinajn tradukojn de ili. Temas interalie pri poemoj el Nederlando, Brazilo ksaj Hungario. Plie aperas ĉin-lingvaj teoriaj artikoloj pri traduk-tekniko, kaj klopodoj traduki kantojn kun muzik-notoj..

• *Primi paşi in Esperanto* (Unuaj paŝoj en Esperanto) estas belaspekta nova baza lernilo por rumanoj verkita de Ionet Onet kaj eldonita de Eldonejo Bero en Kalifornio. La 66 paĝoj prezentas unue enkondukon argumentante por Esperanto, due la bazan gramatikon, plenan listoj de la afiksoj kun ekzemploj, trie la korelativan tabelon. La plimulton okupas Esperanta-rumana vortaro kun fine listo de landnomoj kaj bibliografio de didaktikaj verkoj pri Esperanto aperintaj en la rumana aŭ tradukoj de rumanaj literaturaj verkoj en Esperanton. ISBN 1-882251-03-2. Mendebla kontraŭ 5 USD de Eldonejo Bero, P.O. Box 13492, Berkeley CA 94701, Usono.

Ĉu vi aŭdis, ke...

...aperis nov-speca lernilo kun ĝuste tiu titolo? Ĝi konsistas el 64-paĝa libreto kaj unu son-kasedo. La sub-titolo estas 'kompren-ekzercoj: mezgrada lingvo-nivelo.' kaj la aŭtoro s-ino Katalin Smidéliusz, lingvo-instruistino de la Instruista Trejnejo de Szombathely, Hungario.

Tiu verko estas aparte interesa por ILEI, ĉar ĝi provizas valoran preparan materialon por la mezaj ekzamenoj de UEA/ILEI, precize por ĝia plej malfacila tasko – la aŭskulta kompreno. Jen rekomendinda ekzercaro.

La kasedo prezentas dudek kvin klare kaj ne-rapide deklamitajn tekstojn pri plej diversaj temoj – longaj je tri ĝis kvin minutoj. Legas ilin Perla Martinelli, Petro Murányi, Giorgio Silfer, la aŭtorino kaj kelkaj el ŝiaj studentoj – do reprezentantoj el du malsamaj lingvo-familioj. Muzikaj interludetoj apartigas la erojn kaj la registro-kvalito estas tute adekvata.

Similaj kasedoj por naciaj lingvoj, jam por meza kaj certe por supera nivelo prezentas multe pli kruelajn ekzemplojn, uzante ne studie registritajn modelajn parolojn, sed surstrate registritajn intervjuojn kun ĉiutagaj homoj, tiel ke trafika kaj fona bruo, malklara prononco, fuŝsintaksaj frazoj, idiomoj kaj regionaj akcentoj ege malfaciligas la aŭskultadon, sed zorge rekreas la realajn kondiĉojn sub kiuj lernanto devas funkciigi sian evoluatan lingvo-scion.

Estus riske kaj malkonsilinde ripeti tiun taktikon por Esperanto, almenaŭ en la nuna stadio, kiam tia aŭda materialo estas tiom malofta kaj la plimulto de lernantoj tiom nekutimigitaj al aŭskultado al parolantoj aliaj ol la propra instruisto. Eble estonte ni sufiĉe maturos por lern-kasedoj 'kun obstakloj'!

La libreto havas grafike simplan sed plaĉan aspekton, la 29 testoj estas klare prezentitaj, ĉiu sur nova paĝo. Dek el la testoj uzas la formaton 'Vera/falsa', ok listigas kvar alternativajn finojn al donita frazo, el kiu nur unu konvenas. Du testoj konsistas el teksto kun mankantaj vortoj, aliaj estas de pariga tipo, unu testas la ĝustan uzon de -ig- kaj -iĝ-, unu petas ĝustan vicordigon de serio da resumaj frazoj, aliaj defias kategoriigon. Ĉiu postulas bonan kaj atentan aŭskult-kapablon.

Du lastaj taskoj estis aparte interesaj. En la unua, edzo kaj edzino rakontas siajn memorojn pri sia geedziĝo antaŭ multaj jaroj, sed iliaj memoroj ne estis ĉiam identaj. La aŭskulta tasko estas decidi el listo de faktoj, kiuj estas konfirmitaj kiel ĝustaj de ambaŭ el ili. En la dua, ni aŭdas la rezulton de ies aŭtomata telefona respondilo, kiu prezentas serion da petoj, atentigoj, plendoj kaj devigoj. La aŭskulta tasko estas kompili tabelan taglibran memorigilon por la posedanto de la telefono, sub la rubrikoj: Dato/tago; farendaĵo, persono, tempo, loko, ceteraj detaloj. Sume, valora kaj instiga kompletigo por mezaj kursoj, kaj modelo de la speco da modernaj lerniloj bezonataj.

Ĉu vi aŭdis, ke... Katalin Smidéliusz, Szombathely: Sabatejo, 1993. 62p. 21cm. ISBN963 450 233 4. Test-libro kun akompana son-kasedo. Mendu ĉe UEA: 24 NLG. Speciala prezo por reform-eŭropanoj en hungaraj forintoj ĉe la aŭtoro (adreso dors-kovrile de antaŭaj IPR) aŭ la librobutiko en Budapeŝto. Limigita eldonkvanto, sed represota laŭbezone.

recenzis: smg kaj Soponyai Maria.

ESPERANTO KAJ LEĜOJ

La propono enkonduki la jenan rubrikon venis de pluraj legantoj. Ni memorigas, ke la pli fruaj eldonitaj raportoj de s-ro G. Pirlot ne nur prezentas la kvanton de instruado laŭlande, sed ankaŭ koncize resumas la leĝajn rajtigojn por la instruado. Nia serio malfermiĝas per la raporto de sinjoro Armin GRÖTZNER farita en aprilo 1992 post la renkontiĝo kun gvidantoj de ŝtataj edukaj gvidantoj en Bavario, Germanio.

La estro de la Eŭropa-Unio Forchheim [Forĥhajm] ĉe Bamberg kaj samtempe redaktoro de la bavara paĝo en la *Eŭropäische Zeitung* (Eŭropa Gazeto), sinjoro Franz OCH, sukcesis persvadi la Bambergan deputiton en la bavara parlamento, sinjoron Walter HOFMANN, ke li petu la ŝtatministron pri instruado, kulturo, scienco kaj arto, Hans ZEHETMAIR, ke li donu al kelkaj instruistoj la okazon paroli kun li pri Esperanto. „Por kelkaj minutoj" la ministro estos je nia dispono en paŭzo dum la parlamenta debato je la 18-a de marto, estis la respondo.

Nu, ni malgraŭ la nur „kelkminuta" perspektivo preparis nin je la antaŭa semajnfino por la interparolo en la klubejo de la Nürnberga Esperanto-Grupo kaj verkis tie 1-e tezan paperon pri la neceso de instruado de Esperanto en la lernejoj, 2-e parolkoncepton enhavantan niajn plej gravajn petojn kaj koncepton pri provinstruado de Esperanto en la bazaj lernejoj.

Mallonge dirite: la ministro mem ne venis. Sed li sendis sian ŝtatsekretarion Hermann LEEB, afablan viron, kiu siaflanke petis ne nur la kunlaboranton en la lingva sekcio VI/6, la superan studkonsiliston Hermann ENDRES, sed – sciante pri ties esperantisteco – ankaŭ la superan oficKonsiliston Hans SÜSS el la scienca sekcio. Partoprenis krome du parlamentanoj, nome la jam supre menciita sinjoro HOFMANN, kaj ties kolego sinjoro Heinz HAUSMANN, ambaŭ CSU-anoj, krome nia sinjoro OCH. – Ĉe nia tabloflanko sidis Stefanie kaj Gerald TUCKER, Michael SCHERM, d-ro Gottfried NOSKE, Rudolf BRAND kaj Armin GRÖTZNER.

Entute la interparolo daŭris – je la evidenta malplaĉo de la „ege okupita" sinjoro ENDRES, kiu pro la ĉeesto de la politikistoj ne sukcesis elturni sin – preskaŭ du horojn; kaj ŝajnas esti konvene ĉi tie komuniki la rezulton:

Nia peto, ke estu nomata al ni kompetenta kaj serioze kun nia afero okupiĝanta alirloko en unu de la ekzistantaj sekcioj de la ministerio, trovis la plaĉon de la politikistoj, ne de la lingvoscienculo, kvankam eĉ li fine – aŭ ĉu ĉar li estis laca? – koncedis, ke „oni denove devus pli detale diskuti la materiajn demandojn". La diskuto evoluiĝis vigle; foje ni devis atentigi sinjoron ENDRES, ke sidas antaŭ li fakuloj, kaj ke liaj kontirbuaĵoj venas el mucidiĝanta argu-

mentprovizo, kiun lia sekciestro, la ministeria konsilisto Bruno DORNER, jam antaŭ dek du jaroj estis preparinta por la tiama kulturministro. Tio helpis al ni iom redukti la troan memkonfidon de sinjoro ENDRES kaj ŝajne ankaŭ gajni poentojn ĉe la politikistaj aŭskultantoj. Estas interese konigi la ĉefajn kontraŭesperantajn argumentojn, kiujn ni alfrontis dum ĉi tiu debato:

1-e La okupiĝo pri Esperanto ne konformas al la pretendoj de gimnazia lingvo-instruado; ĉi tiu nur la interkomunikadon celanta lingvo estas ja „tro simpla studobjekto".

2-e Ĉiu lingvo-instruo – sed ne tiu de Esperanto! – peras sentimentan, spiritan edukitecon kaj ebligas al la gedisĉiploj la renkonton kun alia, alternativa kulturmedio kaj kun spirita sinteno de ĉi tiu kreita.

3-e Esperanto ne havas historion, el kiu evoluiĝas la identeco de la koncernaj kulturportantoj. Ĝi ja ne fontas en homogena homgrupo, ne estas grundapartena („bodenständig"), ne havas siajn radikojn en la kulturo de iu konkreta gepatra lando.

4-e La ekonomiaj entreprenoj postulas la konon de fremdaj lingvoj laŭ statistike valorigita katalogo, kies plenumo estas devo por la lernejanoj. Sekve la instru-respondecaj instancoj ne povus pravigi sin, se ili fortenus la junularon de ĉi tiuj postuloj.

5-e Al ĉi tio adicias, ke por uzontoj de Esperanto ekzistas ja tro malmulte da alparoleblaj partneroj. Pro kio do helpus la investo en iun instruadon de Esperanto, se oni krome priatentas, ke tia instruado kostus monon, kiu momente efektive mankas? Pro tio ankaŭ planoj rilate al provmaniera instruo en la bazlernejoj ne havas ŝancon.

6-e En la bavaraj gimnazioj eblas instrui Esperanton en libervole elekteblaj kursoj, eĉ en la supera ŝtupo. Sed ja fakte montriĝis, ke ne ekzistas bezono de ĉi tiu lingvo inter la lernantaro.

Fine de la interparolo proponis sinjoro HOFMANN, ke ni tenu la aferon bolanta: Se ni trovus lertan vojon alparoli pli da parlamentanoj, li provus zorgi pri invito flanke de CSU-partia laborrondo pri kulturaj aferoj. Li ne ekskludis, ke ni niavice turnu nin ankaŭ al deputitoj de la aliaj partioj.

Se estas permesate al la raportanto aldoni unu rimarkon, mi konsilus, ke ni dum venontaj diskutoj nepre ne emfazu la ekziston de Esperanto kaj la postulojn de nia movado. Sed unuavice ni metu senkompate la fingron en la vundojn de la ja fakte ekzistantaj kaj por ĉiu senteblaj lingvaj malfacilaĵoj; ni indiku obstine la psikajn, ekonomiajn, politikajn embarasojn, kies ekkono kaj racia agnosko per si mem gvidos al la okupo pri la esperanta idearo!

IPR menciis tiun viziton (n-ro 4/92, p. 34). Kiu deziras ricevi la german-lingvan tezaron prezentitan skribu al la raportinto:

Armin Grötzner, Giessübel 36, D-W-8640 Kronach-Gehülz, Germanio.

Similaj raportoj el aliaj sekcioj estas bonvenaj!


„Kiuj lernas Esperanton en la mondo: kiel kaj kial?"

Rezultoj de la enketado


Precize antaŭ unu jaro la partoprenantoj de UK en Vieno kaj la legantoj de IPR estis alvokitaj respondi demandojn de enketilo pri instruado. Ĉi-sube vi trovos la rezultojn de tiu enketado: ĉefe cifere, kompreneble tra la okulvitroj de la „statistikinto" — la detala analizo tamen atendas Vin, karaj gekolegoj, ekzemple en Valencio!

I. BAZAJ INFORMOJ

La **nombro** de prilaboreblaj enketiloj estas 125, el **29 landoj**. La plej multaj venis el Hungario (17%), Francio, Nederlando (po 10%), Germanio (8%) kaj Usono (6%). Iom pli da **viroj** respondis ol **virinoj** (58%, resp. 42%), triono de la respondintoj vivas sola. **Laŭprofesie** 52% da ili estas instruistoj; lernantoj kaj studentoj, oficistoj, kuracistoj reprezentiĝas po 8%. La enketila mezulo **aĝas** iom malpli ol 50 jarojn kaj parolas 3,3 **lingvojn**.



Antaŭ Eo	2% ne parolis alian lingvon
	22% parolis nur 1 lingvon
	69% parolis 2–5 lingvojn
	7% lernis pli ol 5 lingvojn (maks. 13)
Post Eo	33% ne lernis pluan lingvon
	29% lernis nur 1 lingvon
	24% lernis 2–5 lingvojn
	4% lernis pli ol 5 lingvojn (maks.11)




Do klare videblas vera intereso pri lingvoj, kiu motivis la plejmulton ankaŭ je konatiĝo kun Esperanto. Kaj nur 33% kontentiĝis trovinte ĝin, 66% ne ĉesis lerni novajn idiomojn! (Eble indus enketi pri ties motivoj...)

Parolante pri la interinfluo de lingvoj, la enketitoj raportas ĉefe pri helpoj, aŭ Esperanto helpis en la sekva lingvo, aŭ la antaŭe lernita(j) helpis ilin en Esperanto. Nia mezulo estas **esperantisto** ekde dekkelkaj jaroj kaj **lernis Esperanton** dum 2 jaroj. Ĉe instruistoj la diverĝo estas pli ekvilibrita, ĉe la alia duono de la enketitoj estas nombre pli granda diferenco inter la du ekstremoj. Bedaŭrinde la enketiloj ne indikas la nivelon de lingvoscio.

II. INSTRUA STRATEGIO

La rangigo de la instruaj-klerigaj celoj aspektas jene laŭ la respondintoj:



III. LA STATUSO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

Instruado sendiference de profesio estas konsiderata absolute plej grava resp. inter la 2-3 plej gravaj taskoj, egalnombre (40-40%). La **oficialigon** oni postulas jam malpli forte (25-40%), cetere la superlativoj (*absolute plej grava* kaj *decidige grava*) multiĝas ĉe la pli aĝaj enketitoj. Tri personoj opinias la oficialan=devigan instruadon evitinda. Verŝajne tiu lingva miso trompis kelkajn, ja inter la celoj la oficialigo=enkonduko de Eo en lernejajn sistemojn, gajnis la duan lokon.

Al kiuj lernejaj tipoj ni dediĉu niajn ĉefajn instruajn fortojn?


infanĝardeno	2%
elementa lern.	34%
gimnazio	31%
universitato	14%
instruistaj trejnejoj	20%
plenkreskuloj	10%

La plej grava instrua-kleriga celo montriĝas la **instruista trejnado**. Triono de respondintoj pensas, ke la formado de instruistoj okazu en E-centroj; alia triono preferus konvinki edukinstancojn enkonduki instruistan trejnadon, t.e. volas ĝin oficialigi; kvarono alirus internaciajn instancojn tiucele. Multaj komentas tiun punkton simile: *tio varias laŭ landoj, depende de niaj rimedoj; internacie estus plej utile, sed praktike restas la unua* (okazigo de kursoj en E-centroj).

IV. INFORMADO KAJ VARBADO

Direkti inform-kampanjojn al gepatroj kaj instruistoj pri la kulturaj kaj internaciaj eblecoj de la lingvo — tiu celo estas la kvara en la vicordo de la enketitoj. Kiuj estas la efikaj **manieroj** je tio? Jen kiel la respondintoj unue eksciis pri Esperanto: 42% de konato; 18% el libro; 14% el ĵurnalo; 9% pro anonco pri kurso; 8% en lernejo; 3% el afiŝo.

Kion indas **emfazi**? Denove ni vidu kiaj estis la propraj motivoj de la enketitoj kaj kiajn varb-proponojn ili havas.



Por ke Eo kaptu la atenton, oni ne devas tro paroli pri renkontiĝoj kaj literaturo (kvankam por daŭrigi la lernadon, iĝi esperantisto, ili estas konside rataj sufiĉe gravaj). Inverse, la profesia utilo iĝos altirforto malgraŭ tio, ke ĝi havas la lastan lokon inter la daŭrigaj motivoj. Simile, la mezaj roloj de vojaĝado ŝanĝiĝas pozitive. La ŝato de lingvoj — kiel jam menciite — estis la plej grava interesigilo por la enketitoj, sed ĉe varbadaj motivoj ĝi cedas la unuajn lokojn al vojaĝado kaj homaj rilatoj. Estas interese analizi ankaŭ la vicordajn ŝanĝojn de punkto ĉ) *sento de aparteno al E-komunumo.*

V. LA KURSOJ

La kvalito de kursoj

Kiumaniere vi eklernis E-on?

	instruistoj	aliaj	entute
ĉeesta kurso	44%	60%	52%
koresponde	26%	23%	24%
nur koresp.	21%	15%	18%
memstare	49%	21%	35%
nur memstare	30%	13%	21%
per radio/tv	1%	–	

La metodoj de kursoj

Kiumaniere vi eklernis E-on?

	instruistoj	aliaj	entute
ĉeesta kurso			
gramatika	24%	8%	16%
rekta	10%	8%	9%
ne respondis	34%	84%	59%.

Se vi partoprenis kurson, kiel vi pritaksis ĝin?

	instruistoj	aliaj
elstare bona	19%	4%
tre bona	23%	37%
bona	50%	45%
malforta	8%	4%
misa	–	4%
respondis	73%	80%

Kiel vi pritaksas la nuntempajn kursojn de Eo?

tre bona 6%; bona 25%; adekvata 29%; eksmoda 21%; maltaŭga 3% (varie 9%; ne respondis 13%)

Kiuj kursoj liveros plej taŭgajn rezultojn?

	instruistoj	aliaj
gramatike bazitaj	12%	15%
Cseh-metodaj	15%	17%
situaci-komunikaj	37%	33%
vidbendaj, komput.	4%	7%
(miksaj	29%	27%)

Al tiuj ciferoj iom kontraŭas, ke inter la plej gravaj aspektoj de la instrua procezo gajnis je 60% *instrui la kapablon konversacii, instrui legadon kaj skribadon* volas nur 7%, ĉiujn kapablojn evoluigus 16%. La aspekto *kreskigi en la lernantoj pozitivan sintenon al la lingvo* same ricevis 14%-an apogon. Se ni rekuras al la grafikonoj de instruadaj celoj, ni konstatos, ke ĉio, kio estas bezonata al tiu *pozitiva sinteno* estas konsiderata samnivele grava: *internacieca etoso en klaso; ligo al la movado; emfazo de translima toleremo, interkompreniĝo kaj kono de fremdaj kulturoj; interŝanĝaj projektoj inter E-klasoj.*

VI. INSTRUADO KAJ MOVADO

Do la *enmovadigo* estas meze grava celo. En propraj motivoj *la sento de aparteno al E-komunumo* (= partopreno en la movada vivo, por simpligo) komence estis la antaŭlasta en la vico, por daŭre okupiĝi pri Eo ĝi kontribuis duavice. Kaj tamen, oni prefere ne uzu tiun movaduman argumenton ĉe varbado — sugestas la lasta loko tiukaze.

Kongruas kun la antaŭaj la respondoj je la demando *Por kontentigi la bezonojn de la kursfinintoj, al kiu ni dediĉu pli da energio:*

— evoluigo de la E-kulturo kaj komunumo (33%)

— kreskigo de la aplikebloj en la ekstera mondo (53%).

Ni finu per kelkaj aforizmaj rimarkoj donitaj je tiu demando: *ambaŭ, sed la unua spontanee okazas, la dua bezonas multan laboron; la dua kontribuas al la unua; ambaŭ necesas, sed kulturo estas la gluo, kaj mono la energio; la demando similas al: "ĉu al laktokafo pli necesas lakto aŭ kafo?".*

Kiel vi pritaksas la ĝisnunan enplektadon de kurs-finintoj en la movadon aŭ en aktivan uzadon de la lingvo?

	instruistoj	aliaj
tre sukcesa	1,6%	1,6%
sukcesa	6,5%	5 %
modera	26,2%	23 %
ne-multa	31,1%	1,6%
malsufiĉa	26,2%	43,3%
preskaŭ nula	6,5%	10 %
(varias	1,6%	5 %)

KOVÁCS Márta

KOMITATO DE ILEI (stato je 22 junio 1993)

En la sekva listo tri ciferoj aperas interkrampe. La unua estas la membronombro por 1992, la dua estas la nombro da komitatanoj permeseblaj, la tria estas la nombro da nomitaj komitatanoj. Mi uzas la lastajn membrociferojn liveritajn. Se mankiĝos ĝisdatigoj, ni amendos la nombron da komitatanoj laŭe.

Brazilo: (23, 2, 2) Aristophio A.A. Filho, Maceio (AL); Valmir Toucci, Santo Andre (SP)
Britio: (13, 1, 2) John Ibbotson, York; Lou Brookes, Upminster
Ĉehio: (1, 0, 3) Vladimir Skoda, Bucovice; Pavla Dvorakova, Praha; Eva Hoffmannova, Praha.
Ĉinio: (67, 4, 4) Yu Dequan, Lu Jixin, Liu Shaozhang, Zhang Danchen.
Hungario: (59, 4, 4) Kovács Márta, Barcsay Zsuzsa, Smidéliusz Katalin, Juhász Ferencné.
Italio: (102, 5, 6) Elizabeta Formaggio, Celavari; Neri Lami Lidia, Livorno; Oliveriieri L. Gabriella, Marina di Massa; De Angeli Bertozzi Jonne, Massa; Naccheri Franca, La Spezia; Solaroli Lucia, La Spezia.
Kroatio: (10, 1, 2) Zdenka Svetlicic, Velika Gorica; Marija Belosevic, Zagreb.
Nederlando: (59, 4, 2) Nora Moerbeek-Bartels; Rob Moerbeek, Beverwijk.
Nordameriko: (85, 4, 2) Doroteo Holland-Kaupp, Santa Barbara; Duncan Charters, Elsah.
Pollando: (25, 2, 2) Maria Czekanska, Wroclaw, G. Mirkiewice.
Slovenio: (5, 1, 2) Sonja Sardoc, Koper; Slava Salamon, Grize.
Svedio: (52, 4, Re-elektataj.)
Venezuelo: (3, 0, 1) Juan Bachrich, Caracas.

Sekve el niaj tridek sekcioj, nur dek tri pretigis sin akcepti siajn demokratajn rajtojn. Ili nomis 36 komitatanojn, el kiuj 32 estas validaj. El la sekvaj landaj sekcioj, spite tri skribajn petojn tra la lasta jaro, ne alvenis al nia sekretario nomumo de komitatanoj: **(interkrampe: membro-nombro, nombro da permeseblaj komitatanoj)**

Aŭstrio (17,2) , Belgio (15,2), Estonio (30,2), Finnlando (31,2), Francio (24,2), Germanio(98,4), Hispanio (23,2), Israelo (6,1), Koreio (6,1), Norvegio(21,2) , Sanmarino(5,1), Slovakio(15,2), Svislando(18,2). Argentino Bulgario Portugalio Sud-Afriko Zairio havis malpli ol kvin membroj kaj sekve ne rajtas je komitatano.

En la 22a de junio ni sendis al la sekcioj ĉi tiun liston kune kun respondilo. Sekcioj, kies nomumojn ni ne ricevis, estis petitaj nomi la indikitan nombron da komitatanoj. Sekcioj, kiuj jam nomis komitatanojn estis petitaj se necese nomi anstataŭantojn, kiuj ja ĉeestos la konferencon en Paterna (31 julio - 6 aŭgusto 1993). Komitatanoj kaj antstataŭantoj devas esti membroj de la Ligo. Anstataŭanto rajtas esprimi maksimume du voĉojn.

La cirkulero krome prezentis kvin temojn, diskutotajn en Paterna: la spezojn por 1992 (vidu p. 34), proponon de la estraro pri nova honora membro, proponon altigi la kotizon de la Ligo ekde 1994 (v. p. 35), proponon investi en Esperanto-Centro Poprad (v. aliloke) kaj la jam prezentita propono, ke ni akceptu la aliĝon de la instruista grupo en Kubo. Eventuale simila propono pri Albanio alvenos. smg

ILEI en la Universala Kongreso!

•• Kunsido de ILEI dimanĉe posttagmeze. Ni skizos la pasintjaran agadon, la celojn por la venonta jaro, invitante komentojn. Ni klarigos la bezonon por pliaj laborfortoj. Ni traktos propon-tekston por eduka rezolucio antaŭmetota al la komitato de UEA, kiu devos trakti la kernan debaton ene de UEA: ĉu ni prioritate servu la ekzistantan esperantistaron, ĉu ni emfazu kaj direktu rimedojn al sistema informado kaj instruado?

•• La ILEI-budo akceptos membriĝojn al ILEI, abonojn al *Juna amiko*, montros niajn eldonaĵojn, akceptos aliĝojn al la 27a kaj 28a ILEI-konferencoj (kaj 2a kaj 3a gimnazioj).

•• Registriĝo por la ekzamenoj de UEA kaj ILEI okazos posttagmeze en mardo.

•• Atentu 15-minutan prelegon enkonduke al la kongresa temo 'Klerigo por la 21a jarcento' de d-ro Duncan Charters en la inaŭguro de la UK. La Tago de la Lernejo mard-matene dediĉiĝos ekskluzive al tiu temo, kun kelkaj prelegoj, iuj de ILEI-anoj, kaj vigla panel-diskuto.

•• Serĉata ankoraŭ kvara gvidanto por konversaciaj rondoj. Kompetentulo anoncu vin tuj al ILEI kaj la KKS de UEA.

ARANĜOJ POR JUNULOJ KAJ INSTRUISTOJ EN 1993

Julio 31-6 Aŭg.: 27a Konferenco de ILEI kune kun la 2a ILEI-Gimnazio. La Paterna, Valencio, Hispanio. Eblas ankoraŭ aliĝi al ambaŭ, eĉ dum UK.

Julio 31-8 Aŭg.: Internacia Junulara Semajno, en kastelo Mikosszéplak en sud-okcidenta Hungario. HEJ, Tibor Budai, pk. 263, H-8901 Zalaegerszeg. Poste komuna karavano al...

Aŭg 7-14: 49a Internacia Junulara Kongreso, Vraca, Bulgario. Aliĝiloj de la CO de UEA au LKK: pk 26, BG-3000 Vraca.

Aug 6-13: Familia renkontiĝo. Sümeg, Hungario (apud Lago Balatono). Plena partopreno 130 DEM. Informoj: Ernó Csiszár, Erdódy Pálffy Tamás u. 25 u. 16, H-8100 Várpalota, Hungario.

Aŭg 19-31: Por la instruantoj, pedagogia helpo, instruiloj, kursoj. Kastelo Grésillon. D-ro Charters gvidos 19-23 aŭg. Ekzamensesio fine gvidota de S. MacGill.

Aŭg 19-22: Kultura Esperanto-Festivalo (KEF4), Kopenhago, Danlando. Programo 250 DKR. Lisbeth Wahl, Sigvald Olsensgade 4,2 th., DK-2450 Kobenhavn SV, Danlando.

Aug 21-28: Internacia Studsemajno, Habères-Poche, 25km de Thonon en la francaj alpoj. Informoj: Centre Culturel Esperanto, 5, Rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio; tel. (+33) 67 54 15 43.

Aŭg 28-sept. 5. Dekdua SUS: Sanmarina Universitata Sesio de AIS, sekvata de studsesio en Prago. Informoj kaj aliĝoj: Dr. Petr Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobrichovice, Ĉeĥio.

Sept. 4-11. Simila studsemajno en Sete, apudmare. Gvidantoj: Babin, Moirand, Favre, MacGill. Sama kontakt-adreso.

Sept. 24-26: Intensiva kurso pri komunika instruado. Gvidos S. MacGill laŭ *Tendaraj tagoj*. Budapeŝto. Kursokosto: 1000 HUF aŭ 50 NLG, kiu inkluzivas unu manĝon tage, la librojn kaj la kurson. Loĝigon oni aranĝos laŭbezone. Aliĝu ĉe: Erika Toth, Kinizi 6, HU-2360 Gyál, Hungario.

Sept. 25-30 Sept. 19a Internacia Foiro de E-turismo kaj semajno de kultura interŝanĝo. Monda Turismo. Bydgoszcz, Pollando. Esperantotur, Str. M. Skloodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz.

Okt. 14-17: Ripeto de la supra kurso en Esperanto-Centro Poprad, Sobotske nám 6, 058-01 Poprad. Kosto por plena loĝigo 48 ĝis 60 gld.

Okt. 16-17: Kolokvo 'Esperanto kaj la 21a jarcento' organizita de UFE kaj TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) en Mittelwihr, Francio (apud Colmar). Prelegos i.a. Texier, Triolle. Informoj: Edmond Ludwig, 26, rte de la Schlucht, F-68140 Stosswihr, Francio.

Dec. 27 - jan 3. Deka IF (Internacia Festivalo) por personoj 25-55-jaraĝaj kaj junaj familioj. Sensenstein, Germanio (35km. de Kassel). Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein, Germanio.

Kultura Centro Esperantista ofertas programojn tutjare. Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Same Kastelo Grésillon kaj E-Centro Poprad.

KONFERENCA PROPONO:

Esperanto-Centro Poprad proponis al ILEI, kune kun aliaj unuopuloj kaj asocioj, fariĝi part-posedanto, kiam tiu centro transformiĝos al kompanio kun limigita respondeco. Niaj estraranoj kaj sekciestroj ricevis unu-paĝan dokumenton pri tio. Ni petos la komitaton en Paterna principe akcepti tiun proponon, efektivigebla kiam la definitiva jura fondo-dokumento estos studebla kaj trovita en ordo. La direktoro de la centro, s-ro Milan Zvara, prezentos konkrete la proponon en la ILEI-kunsido en la UK, dimanĉ-posttagmeze.

Verkoj de niaj membroj...

La senmorta piano, Ĥana Karmi. Tel-Aviv: Esperanto-Instituto en Israelo, 1992. 80p. 21cm. Ilus. Redaktis: Josef Murĵan.

Ĉi tiu libro ne apartenas al literatura ĝenro nomata 'fikcio' kvankam ĝi eble ŝajnas esti tia. La rakonto estas bazita sur faktoj antaŭ, dum kaj post la preskaŭ nekredebla odiseado de eksterordinara antikva unika piano. Muzikisto Avner Karmi post multaj aventuroj sukcesis retrovi la faman instrumenton kaj redoni al ĝi la iaman brilon. Post la morto de Karmi, lia edzino Ĥana ellernis Esperanton kaj decidis ankaŭ al Esperantujo rakonti la fascinan familian sagaon. Ŝi esperantigis la aŭtobiografian verkon, kiun ŝi kune kun la edzo publikigis iam anglalingve. La verko aperis ankaŭ en la germana, itala, japana kaj nederlanda lingvoj. Nun ankaŭ la esperantistaro havas eblecon konatiĝi kun tiu vere fascina rakonto. Ĝi estas uzebla kiel legmaterialo en mezgrada kurso. *Recenzis: la redakcio.*

Kalendaro 1993, de Marin Bacev, tre konata pedagogo el Bulgario, aperis ĉe la Bulgara Instruista Esperanto-Societo. Ĝi estas 32-paĝa.

Post kelkaj ĝeneralaĵoj (Esperanto-alfabeto, la ciferoj, la monatoj, semajnoj kaj tagopartoj, la vetero kaj la sezonoj, la hor-indiko) de la paĝoj 4 ĝis 28 sekvas identa skemo: sur la maldekstra paĝo troviĝas poemoj (originalaj, tradukitaj kaj reverkitaj) kiuj servas por ilustrado de la leksiko donita en la kalendaro. Sur la korespondaj dekstraj paĝoj ni trovas: la tagnumeron, la tagnomon, liberan lokon por skribi memorendaĵon kaj en la fino unu vorton (substantivon), entute do 365 vortojn en la kalendaro.

Malsupre de ĉiu kalendara paĝo troviĝas kelkaj esencaj informoj pri la gramatiko aŭ aliaj ĝeneralaj informoj kaj fine listo de vortoj en la bulgara.

Temas do pri modesta verkaĵo, destinita "kaj por malnovaj esperantistoj, dezirantaj varbi novajn adeptojn de Esperanto, kaj por amikoj de Esperanto, kiuj volus interesigi neesperantistojn ekstudi la Internacian Lingvon montrante al ili la amason (pli ol 2500) da bulgaraj vortoj, kiuj samtempe estas uzataj ankaŭ en Esperanto... Instruistoj de Esperanto povas utiligi la leksikon de la Kalendaro en simplaj propozicioj." (laŭ la intenco de la aŭtoro). Prezo: 3 internaciaj respondkuponoj de Marin Bacev, P.K. 1054, BG-1000 Sofia.

Recenzis: E.Symoens

RECENZO-HELPANTOJ BEZONATAJ

IPR daŭre kaj urĝe bezonas helpantojn por malpezigi la redakcian ŝarĝon por permesi al ni pli frue aperigi la revuon. Precipe utilaj estas recenzetoj de pedagogiaj verkoj, similaj al tiuj supre, kiuj simple skizas la enhavon, celon kaj utilon de la verko. Kiu volas kunlabori, bv. kontakti la redakcion. Ni sendos verkojn por recenzo; ankaŭ nepetitaj recenzetoj bonvenas, kondiĉe, ke temas pri eduka aŭ pedagogie uzebla verko.

Financa raporto pri ILEI en 1992

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
Membrokotizoj	36.227:26	IPR	42.368:67
Libroj	371:74	Bankkostoj	939:80
Fondaĵo Szerdahelyi	2.338:-	Informiloj	7.627:21
Konferenco	11.358:46	Presaĵo, fotokopioj ktp	5.448:22
Ekzamenoj	2.167:15	Faka kotizo, UEA	1.031:58
Donaco	400:-	Estraro, vojaĝoj	3.554:30
Kompenso UEA	11.722:50	Azia agado	2.067:40
Koleghelpa konto	409:60	Lerneja tago en UK	1.104:-
JA, kontribuo al lasera printilo	608:87	Honorarioj	9.758:70
Diversaĵoj	2.976:40	Lukostoj, Budapeŝto	1.167:60
Rentoj	8.377:48	2:a Interlanda Konf.	5.470:50
	78.985:68	1:a Eŭropa Kunveno de E.	242:75
Malgajno	11.800:47	Lasera printilo,oficeja seĝo	6.230:39
	90.786:15		90.786:15

AKTIVO	1991-12-31	1992-12-31
En kaso	0	0
Banko: SE	57.442:64	72.385:54
Frosta	18.802:69	20.320:83
Poŝtĝiro	2.552:36	5.860:06
UEA, ilek-a	42.244:45	22.782:76
Ce GCA	2.902:84	-
Librostoko	8.000:-	6.000:-
Stoko de filatelaĵoj	200:-	50:-
Nepagitaj fakturoj	600:-	2.000:-
Havaĵo ĉe sekcioj	-	2.000:-
2:a Interl. konf. prunto redonata	-	5.470:50
JA, šuldo	-	3.920:-
Lasera printilo	-	5.000:-
	133.744:98	145.789:69
PASIVO		
Koleghelpa konto	329:80	739:40
Fondaĵo Szerdahelyi	17.844:65	17.263:18
Rezervo por eldono	9.107:37	9.107:37
Šuldoj: GCA	-	5.875:65
lukostoj Bp	-	2.800:-
Fond. Sz.	-	2.735:25
aliaj	-	653:-
Propra kapitalo	105.165:16	106.615:84
	133.744:98	145.789:69

1992-12-31

Bertil Andreasson

Bertil Andreasson
kasisto ILEI

Detaligoj:

IPR

Rubriko	4/91	1/92	2/92	3/92	Entute
Presado	5.517:75	5.517:75	5.517:75	4.598:20	21.151:45
Ekspedoj	677:75	668:55	668:55	589:02	2.603:87
Afranko	2.712:05	3.083:-	3.037:67	3.540:74	12.373:46
Kompostado					
GCA	64:14	64:14	64:14	623:65	816:07
Hungario	972:-	1.080:-	972:-	1.188:-	4.212:-
Kroma folio	641:40		534:50		1.175:90
Fotoj				35:92	35:92
	10.585:09	10.413:44	10.794:61	10.575:53	42.368:67

Koleghelpa kaso

Saldo 1991-12-31		329:80
Donacoj 1992	1.559:60	
23 membrokotizoj	- 1.150:-	409:60
Saldo 1992-12-31		739:40

Fondaĵo Szerdahelyi

Saldo 1991-12-31		17.844:65
Donacoj	474:53	
2:a Interlanda Konf.	- 2.338:-	
Rento 1992	1.282:-	
Saldo 1992-12-31		- 581:47
		17.263:18

Eldonoj

Rubriko	Enspezoj	Elspezoj	Rezulto
Tendaraj Tagoj I	4.893:04	1.264:63	3.628:41
Tendaraj Tagoj II	9.368:09	12.375:88	- 3.007:79
IE-broŝuro	1.379:19	329:01	1.050:18
Symoens: La valoro			
franca	233:80		233:80
angla	123:62		123:62
Komenio-libro	1.262:60	1.262:60	0
	17.260:34	15.232:12	2.028:22

Evoluo de la eldonado

Rubriko	1991-12-31	1992	Stato
Tendaraj Tagoj I	1.177:12	3.628:41	4.805:53
Tendaraj Tagoj II		- 3.007:79	- 3.007:79
IE-broŝuro	3.451:22	1.050:18	4.501:40
Symoens: La valoro..			
franca	- 3.301:83	233:80	- 3.068:03
angla	- 3.801:48	123:62	- 3.677:86
Komenio-libro		0	0
			- 446:75
Rezervo por eldono	9.107:37		

JUNA AMIKO

Enspezoj (SEK)		Elspezoj (SEK)	
Abonoj, donacabonoj	18.572:15	Anoncoj	597:85
Subvencio, hungara ministerio	11.500:-	Afranko	4.972:52
	30.072:15	Preskostoj	10.676:-
		Ekspedoj	3.835:-
		Lasera printilo	608:87
			20.660:24

Rezulto: 30.072:15 - 20.660:24 = 9.411:91

Ŝuldoj al ILEI: honorario	920:-
lukostoj	3.000:-
	3.920:-

Gajno 1992: 9.411:91 - 3.920:- = 5.491:91

Saldo:	1991-12-31	1992-12-31
Banko	2.501:60	6.333:44
UEA-konto: juna-1	819:48	6.399:55
	3.321;08	12.732:99

Ni publikigas tekston, kiun ricevis niaj sekcioj en junio, kune kun la supra financa raporto:

'La finkalkulo por 1992 klare montras maltrankviligajn tendencojn. Unue, ni multe suferis pro la drasta falo en la valoro de la sveda krono. Tio kaŭzis, ke unuafoje la sumaj kostoj de IPR signife superas la sumajn enspezojn de kotizoj. Ni unuafoje en jaroj havas deficiton (ĉ. 10% de niaj jaraj spezoj). Por teni la nunan kreskon de agado (gimnazio, instruistaj kursoj, *Juna amiko*, eldonado) ni havas novajn kostojn: luon, honorariojn ks.

Minimuma bezono estas, ke la kotizoj kovru almenaŭ la bazajn kostojn pretigi kaj liveri IPR. Nia presisto, FEL, kunlaboras por ŝpari kostojn, tamen la nuna situacio bezonas resanigon. Sekve la estraro proponas kotiz-altigon por 1994. Nur surloke en Paterna eblos decidi la precizan sumon en diversaj valutoj, sed ni antaŭvidas proponi altigon de la nuna 16 NLG ĝis almenaŭ 20 NLG (en svedaj kronoj de 50 ĝis 80 aŭ 90).'

Tiu plialtigo ne celas kreskigi la agadon, sed plenumi plue la nunan sen deficito.

Malagrable estas fermi nian revuon per tia novaĵo, sed necesas rigore limigi nin al 36-paĝaj numeroj. Sekve, nia lasta rubriko estas telegram-stila listigo de eroj ellasitaj pro spaco-premo:

- Raportoj de la sekcioj pri la agado (kompilis nia sekretario, kiu prezentos la rezultojn kaj gvidos laŭlandan diskuton en Paterna.)
- Libroserva mendilo. Notu, ke aperis la dua eldono de *Tendaraj tagoj* kun 4 novaj kaj 8 reviziitaj paĝoj, iuj kun koloro. Prezo senŝanĝa: 12 NLG (kun triona rabato ĉe UEA).
- Diskuto promesita pri la transitiveco de verboj.
- Raporto de la prezidanto pri la pasinta jaro. Tio prezentiĝos en Paterna kaj inkluzivos laborfortan buĝeton, montrante eĉ pli akran deficiton ol nia financa buĝeto, sed celanta servi al klopodoj glatigi la vojon antaŭen.

Ĝis revido en Valencio, Paterna, Seŭlo, Kangnam aŭ aliloke!

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, 625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, F-74920 Combloux.
Germanio: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, DE-W-8900 Augsburg *(eble ŝanĝota)*
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: *vakas kaj forstrekota.*
Korea Resp.: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Zdenka Svetličić, Kroatia Esperantista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb
Nederlando: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe *(eble ŝanĝota)*
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: *Turnu vin al* NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw 17
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, RO-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby
Svislando: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo: Prof. Juan Eduardo Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Kubo: Hector Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C. Habana.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle.
Ekzamenoj: Elementa kaj meza niveloj : Provizora sekretario: S. MacGill
Supera nivelo: Sekretario serĉata.
Prezidantaro: d-ro Till Dahlenburg plus du nomotoj de UEA.
Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666 62 66.
Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36 86 29.
Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet.
Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore Budapeŝto plenumas. *Ni traktas kun nova plenumanto en Usono.*
Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15 65.
Terminologio: *vakas*
UN-Jaro de la Familio 94: Glossop-MacGill

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.
KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.
ECP: Esperanto-Centro Poprad, Sobotske nám. 6, 058 01 Poprad, Slovakio. Konto: 18431-563/0200 de Vŝeoecna ŭverova banka, Poprad.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por OKR-enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur la manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGOJ POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:
Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 50 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 80 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:
UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĉk 37 89 64. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: **ilek-a**. Se rilatas al *Juna amiko*, uzu konton **juna-l**. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri via enpago. Membreco: 16 GLD en landoj sen sekcioj, 24 GLD en landoj kun sekcioj.
Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo. Konto: OTP Budapest XXII ker, fiók 546-006891-8.